

UNUA JARO

1922 DECEMBRO

NUMERO 3

LITERATURA

MONDO

RESPONDA REDAKTORO: D^{RO} TEODORO SCHWARTZ

REDAKTA KOMITATO: JULIO BAGHY, DRO KOLOMANO DE KALOCSAY,
PAŬLO DE LENGYEL, PAŬLO BALKÁNYI, ADALBERTO BAYER

ADMINISTREJA DIREKTORO: ANDREO BÁN

NIA KUNLABORANTARO: LOUISE BRIGGS (ARMLEY), J. GRAU CASAS
(BARCELONA), F.E. HAINE (BRUXELLES), NIKOLAO HOHLOV (ZAGREB),
DRO EMIL PFEFFER (WIEN), IVAN H. KRESTANOFF (DRESDEN), PAUL
MEDEM (KAUNAS), EMMA H. OSMOND (LONDON), M. SOLOVJEV
(SKOPLJE), JULIO WERNER (BUDAPEST), DRO LEONO ZAMENHOF
(VARSOVIO)

REDAKTEJO KAJ ADMINISTREJO: BUDAPEST VI, ANDRÁSSY-UT 81

PRESITA: GLOBUS PRESARTINSTITUTO A. S.

KARAJ GESAMIDEANOJ!

La Kristnasko jam frapis sur la pordo kaj la Nova Jaro staras antaŭ la sojlo. Ni profitas ĉi tiun okazon por tutkore deziri al vi agrablajn festotagojn kaj feliĉan novjaron. Ni ne venas kun malplenaj manoj al vi, ĉar kune kun niaj bondeziroj ni metas sur vian tablon la plej freŝan numeron de la „Literatura Mondo“. Ĝi estas vera donaco, kiu postulis de ni oferojn, sed ni faris tion volonte, ĉar per tio, ni volis esprimi nian dankon por la sincera kaj komprena akcepto, por viaj gratuloj. Per tiu ĉi numero ni volas doni pruvon al vi pri tio, ke niaj entuziasmo, persisteco, sindonemo al la grava entrepreno ne malpliigis, eĉ plifortiĝis. Per tio ni volas montri, ke estu konvinkigintaj la dubantoj, ke nia serioza klopodo staras sur firma financa bazo kaj neelĉerpebla morala fundamento. Per tiu ĉi lasta ni aludas je tiu ĉi morala fundamento, kion ni trovis en viaj koroj.

Ni ne eraris do, opiniante, ke la Esperantistaro jam estas matura havi *belegan, grandan kaj ampleksan fakan gazeton por literaturo kaj arto*, kiu inde povus esti komparata kun la nacilingvaj revuoj.

„Krom *Esperanto* de U.E.A. kaj *Esperanto Triumfonta*, nepre *LITERATURA MONDO* devas esti abonata de ĉiu serioza Esperantisto“ — skribis al ni unu el niaj legantoj. Ni konsentas, ĉar nur tiam ni povos efektiviĝi tute nian programon kaj doni ampleksan, luksan, rimarkindan, artan revuon al la tutmonda Esperantistaro, se *ĉiuj kunhelpas kaj subtenas nian laboron*, donante al ni fincan kaj moralan rimedojn.

Dankon kaj koran bonvenon al ĉiuj!

LA REDAKTA KOMITATO

Prezo de unu numero: 1 svisa franko aŭ egalvaloro.

ABONPREZO POR UNU JARO:

2.— dolaroj	10.— svis. frankoj	10.— norv. kronoj	40.— liroj
5.— guldenoj	10.— danaj kronoj	12.— pesetoj	60.— ĉ. kronoj
7.— sved. kronoj	25.— fr. frankoj	10.— ŝilingoj	5.— jenoj

Abonojn bonvolu sendi laŭeble en registrita letero al nia adreso, aŭ en la sekvantaj landoj, al niaj abonejoj:

Aŭstrio: Wien, Esperanto-eldonejo „Nova Tempo“, VI., Molardgasse 55.
Britujo: The British Esperanto Association, 17, Barts Street, London, W.C. 1.
Bulgario: Centra Librojo Esperanto (Galevsky) Sofia.
Belgio: Frans Schreurs, 40, Kleine Beerstraat, Antwerpen, Postĉekkonto: No 284, 20, — E. Haine, 21, rue du Marais, Rixbroek, Bruxelles.
Ĉeĥoslovakio: Otto Sklenicka, Hradec Králové.
Danujo: Martin Illicher, International Boghandel, Hotel d'Angleterre, Kobenhavn.
Eŝujo: Helmi Dresden, postkanto 6, Tallin.


Francujo: Raymond Schwartz, 4, rue d'Hauteville, Paris.
Finnlando: O.Y. Mervola A/B, Helsinki, Kasarminkatu 20.
Hispanujo: Konrado Domenech, Hotelo Flora Banyoles, Girona. — Ferdinando Montserrat, Barcelona, Str. Villarroel 107, 2^a 2^a.
Italio: Johano Mainardi, Viale Vittoria 1, Milano 21.
Jugoslavio: D. D. Maruzzi, Zagreb, Jezuitska ul. 1.
Polujo: Adolfo Oberrodman, Krak. Przedm. 10, Warszawa (P. K. O. n-o 3125).
Rumanujo: Esperanto Oficejo, Cluj.

LAŬBLE SENDU ALTIAN MONON KAJ NE LAVEROS TIUN DA NUMEROJ, KIOM VALORAS LA PAGO:

Vi povas ankaŭ pagi per ia ajn banko al sekvantaj naciaj bankoj, por la konto de Hungara Ĝenerala Kreditbanko (Banque Générale de Crédit Hongrois Ungarische Allgemeine Creditbank), Budapest, por „Literatura Mondo“:

NACIAJ BANKOJ:

Amsterdamo: Amsterdamsche Bank
Bratislavo: Slovenská Všeobecná Uverná Banka
Berlino: Direction der Disconto Gesellschaft
Bruxelloj: Banque de Bruxelles
Kristiano: Den norske Creditbank
Kopenhago: Kobenhavnske Handelsbank
Milano: Banca Commerciale Italiana
Londono: The National Provincial & Union Bank of England Ltd.
New-Yorko: Guaranty Trust Corp. of New-York
Parizo: Banque de l'Union Parisienne
Sofio: Banque Balkanique
Stockholmo: Skandinaviska Kreditaktiebolaget
Zürĉo: Schweizerische Bankgesellschaft



BENCZUR: PETŐFI

ALEKSANDRO PETŐFI

1823–1849

La hungara nacio festas la centjaran datrevenon de la naskiĝo de sia plej genia lirika poeto Petőfi. La nacio rememoras pri sia filo, kies meteorsimila apero kaj malapero lasis por ĉiam sian lumon en koro de ĉiu hungara generacio. Sed ne nur la hungaroj festas, nun rememoras pri li la literaturaj medioj de aliaj nacioj, ĉar li estas ne nur nacia, sed ankaŭ internacia poeto, kies genio iris trans la landlimojn.

Lia vivo estis erupcia, senĉese alternanta inter sufero kaj ĝojo en malespero kaj gloro. La vivo donis al li ĉion, escepte riĉecon kaj longajn jarojn.

Post forigo el la liceo, pro pasia vizitado de la teatroj, li ĵetis sin en la ventegon de la vivo kaj sen protektantoj, sen ia ajn subteno li komencis la lukton por la ekzisto. Neestingeblaj sopiroj flamis en lia koro kaj lia ekstrema karaktero kvazaŭ pelis lin por serĉi la vojon al la senmorteco. Netrovante helpon kaj mecenojn li soldatiĝis pro malespero, sed baldaŭ lia malsano liberigis lin el la militservo kaj li fariĝis migranta aktoro. Li ekvagis tra la lando, sed konvinkiĝinte, ke li neniam povas fariĝi fama aktoro, baldaŭ li revenis al Peŝto. Tiutempe jam kelkaj el liaj poemoj estis bone konataj. Oni ekkonis lin kaj la famo levis lin al piedestalo de la gloro kaj li fariĝis idolo de la junularo. Li studis fremdajn lingvojn kaj tradukis. Li edziĝis kontraŭ la volo de la gepatroj de la fianĉino sed lia familia vivo estis feliĉa. En la batalo por la libereco li fariĝis majoro, adjutanto de generalo Bem. La ardanta patriota sento igis lin serĉi la plej grandajn danĝerojn en la bataloj kaj en sia dudeksa jaro li fariĝis heroa viktimo en la malgajnita batalo ĉe Ŝeĝeŝvár. Neniu scias, kie kaŝas lian cindron la patrino tero.

Spontana sincereco, vere ideala entuziasmo, flamema senpacienco, oferemo, vanteco, barojn detruanta energio, katenojn netoleranta liberamo karakterizis lin kaj liaj poemoj respegulas ĉion ĉi.

Liaj plej famaj poemoj estas: „La apostolo“, en kiu li rakontas la martirvivon de viro, kiu batalas por la popol-libereco. En tiu ĉi poemo Petőfi vere donas sin mem kune kun siaj tiranmalamo, komprenemo por mizeruloj, profeta povo; „Johano la Brava“, en kiu li rakontas pri amo, malfeliĉo, formigro, aventuroj, heroaj faroj kaj veno en Feolandon de juna kamparano; sennombraj popolkantoj, en kiuj li pentris la allogan dolĉecon de la kampara vivo. La naturpentrantaj poemoj montras lian amon al sia amata ebenaĵo, kie li naskiĝis, kie vivis liaj simplaj gepatroj.

La mizero de la vagabonda vivo plantis profundajn pensojn en li, lia penetra observemo igis lin vidi la mondon tia, kia ĝi estas, kaj li disŝutis la trezorojn de sia koro kun senafekta simpleco kaj malavareco. La florpolve freŝeco de liaj poeziaj floroj eĉ nun, post cent jaroj; restis pompanta. La tempo ne povis velkigi ĝin, ĉar la lingvo kaj esprimriĉeco de lia poezio kaj profunda graveco de liaj pensoj estas tiel modernaj, tiel aktualaj, kvazaŭ la hodiaŭo estus naskinta ilin.

Nemirinde, ĉar li anticipis ja epokojn kaj okupas rajtan lokon en la Parnaso de popoloj.

EL LA POEMOJ DE ALEKSANDRO PETŐFI

TRADUKO DE
KOLOMANO DE KALOCSAY

FINO DE SEPTEMBRO

Floradas ankoraŭ la floroj en valo
Kaj verdas ankoraŭ la poplo ĉe l' pont',
Sed vidu, jam tie la vintra vualo,
La neĝo ekkovris la supron de l' mont'.
En kor' mia juna kun fajra radio
Printempe brilegas ankoraŭ la sun',
Sed griza jam iĝis ĉe mia tempio
La nigra harar' pro la prujn' de aŭtun'.

La floro forfalas, la vivo forpaŝas...
Alflugu, edzin', ho amata kolomb',
La vangojn sur bruston nun mian vi kaŝas,
Ĉu eble ne — baldaŭ — sur herbojn de l' tomb'?
Ho diru, se mort' min antaŭe forŝiros,
Ĉu restos mi ĉe vi en plora memor',
Aŭ iam la am' de junul' vin altiros,
Kaj nomon la mian faligos vi for?

Se ĵetos vi for la vidvinan vualon,
Ĉe l' tomb' ĝin pendigu, flirtigu ĝin vent',
Ĝis flagon la nigran, lasinte for valon
De l' mort' mi subportos en nokta silent',
Deviŝi la vangojn malsekajn de ploro
Pro vi, forgesint' kun facila anim'
Kaj vindi la vundon kruelan de l' koro
Amonta eĉ tiam, eĉ tie, sen lim'.

LA VENTO

Nun, kun mola flustro, milda vent' mi estas,
Mi la verdajn kampojn tra- kaj trapromenas,
Kison spiras mi, la dolĉan, varman kison
Lipoj de l' burĝonoj amdonace prenas.
„Floru, ho filinoj belaj de l' printempo,
Floru, floru!“ — diras mia dolĉ-susuro.
Ili senvestiĝas kun hontemo ĉarma,
Sur ilia brust' mi svenas pro l' plezuro.

Morgaŭ blov' sovaĝa, sibla bru' mi estos,
Tremas antaŭ mi, ĉar timas min la branĉo,
Scias, ke mi havas en la man' tranĉilon,
Kaj defalos ĝi per ĝia akra tranĉo.
„He, knabinoj stultaj, trokredemaj, velku!“
Siblas mi al palaj floroj ĉeorele.
Ili velke falas brusten de l' aŭtuno
Kaj mi ridas ilin moke kaj kruele.

Nun kun flu' pli mola ol river' trankvila
Tra l' aero naĝas mi silente, pace,
Pri ekzisto mia scias nur abelo,
Se ĝi hejmenvenas de la kampo lace.
Se jam pene flugas la abel' pro ŝarĝo,
Kiun ĝi kunportas por miel-prepari,
La skarabon etan prenas mi sur manon
Por flugadon ĝian pli facila fari.

Morgaŭ uragano kun hurlanta muĝo,
Sur ĉeval' sovaĝa tra la mar' mi bruas.
Kiel instruisto al infan' petola
Mi la verdajn buklojn de la mar' ekskuas
Se mi trovas ŝipon, mi flugilon ĝian,
La flagrantan velon, ŝiras furioze,
Skribas mi per mast' sur ondojn ĝian sorton:
Ke ĝi ne plu kuŝos en haven' ripoze.

KIEL STRANGE SONGĜIS MI...

Kiel strange songĝis mi ĉi-nokte! Mian koron pikis vi, trezor'. Tuta sang' elfluis el la kor'... sed Ĉiu guto iĝis ruĝa flor'...

Kio estas la signif'? Nenio, Krom ke tia estas ama sent': Morte ĝi turmentas nian koron, Tamen estas dolĉa la turment'!

MAJSTRO PAŬL'

Cerbumis majstro Paŭl' ĉi-maniere, Kaj sur okulojn La ĉapon ŝovis li sovaĝfiere: „He, per diablo! Por kio ja edzin'! Mi ŝin enuas! Sen ŝi la vivo pli libere fluas. Forpelos mi ŝin... tiel ŝajnas sorto...“ Kaj jen, li agis ĝuste laŭ la vorto.

Cerbumis majstro Paŭl' ĉi-maniere, Sed sur okulojn Ne ŝovis ĉapon nun sovaĝfiere: „He, per diablo! Forpeli tamen estis ŝin domaĝe, Ŝi pligrandigis la havaĵon saĝe. Nun ĝi pereos... tiel ŝajnas sorto...“ Kaj jen, okazis ĝuste laŭ la vorto.

Cerbumis majstro Paŭl' ĉi-maniere, Kaj sur okulojn Denove ĉapon ŝovis li fiere: „He, per diablo! Ja min malĝojo plu ne persekutos, Eĉ, kio restis, tion mi forŝutos. Jes, mi forŝutos... tiel ŝajnas sorto...“ Kaj jen, li agis ĝuste laŭ la vorto.

Cerbumis majstro Paŭl' ĉi-maniere, Kaj sur okulojn La ĉapon ŝovis li malĝojkolere: „He, per diablo! Ja estas jam je ĉio, ĉio fin' nun, Do kion fari? Ĉu pendigi min nun? Jes, mi pendigos... tiel ŝajnas sorto...“ Kaj jen, okazis ĝuste laŭ la vorto.

LA BOSKETON BIRDO RAVAS

La bosketon birdo ravas, La ĝardeno floron havas, Kaj la nokto havas stelon, Kaj la fraŭlo — koranĝelon.

Floro floras, birdo trilas, La radi' de l' stelo brilas, Kaj ŝi — brilas, trilas, floras, Ilin ĝoja kvar' adoras.

Ha, ja baldaŭ flor' ekpalas, Bird' forflugas, stel' defalas. Sed knabino — tie restas. Plej feliĉa — fraŭlo estas.

KANTO DE LA HUNDOJ

Fajfegas la ventegoSub peza, nigra nub'De l' vintro du ĝemeloj:Frapadas neĝ'
kaj pluv'.

Sed kiom nin koncernas!La bona grand-sinjur'En kuirej-anguloNin lasas kun
favor'.

Pri manĝo ni ne zorgas;Post lia satmanĝad'La niaj estas ĉiujRestaĵoj sur la
plad'.

Ja vere, ke kelkfojeEksonas vipa plaŭd',Doloras plaŭdo, sed jaSaniĝas hunda
haŭt'.

Kaj se kolero pasis,Nin vokas la Sinjur',Piedojn liajn lekasNi kun feliĉa kor'.

KANTO DE LA LUPOJ

Fajfegas la ventegoSub peza, nigra nub'De l' vintro du ĝemeloj:Frapadas neĝ'
kaj pluv'.

Ni loĝas en la nudaDezerto sen defend',Ne ŝirmas tie nin eĉArbeta
branĉotend'.

Ekstere la malvarmo,Interne la malsat':Du niaj turmentantojNin pelas sen
kompat'.

Kaj tie, jen la tria:Pafil' kun kugloŝut'.Ruĝiĝas blanka neĝoPer nia sangogut'.

Ni frostas kaj malsatas,Hurlante pro l' mizer',Kun kuglo en la flank'... sedNi
vivas en liber'!

KRISTNASKA DONACO

IVAN VAZOV

Restis nur unu tago ĝis Kristnasko. La vintro furiozis. La englaciiginta Vitoŝa-
montaro severe rigardis el sub sia blanka mantelo, trafendita kelkloke de akraj rokoj.
Frosta vento, boranta ĝis la ostoj, blovis de la neĝaj pintoj super Sofian. Era neĝo kaj
prujno traflugis de tempo al tempo en la frostiginta aero, pilkevolvis sin kaj kovris la
tegmentojn, kortojn, stratojn. Estis malvarmege. La kamentuboj elĵetis nigrajn
kolonojn de fumo al la senvoĉa griza ĉielo, kaj mirinde, tiu ĉi fumo estis nun tiel gaja,
tiel ĝentila, tiel ĝojigis la animon! Ĝi memorigis la varmon, la bonfarton, la
kontentecon, kiu ĉirkaŭis la feliĉulojn en tiu ĉi mondo, spite la frostoj, la Vitoŝaj
ventegoj, la glacia mortiga spirado de la vintro...

Nome, tiun vidaĵon ĝuadis de sia fenestro, sidiĝintaj sur la mola kanapo, gesinjoroj Jordanov, edziĝintaj antaŭ unu kaj duono jaroj. Canko Jordanov, grava oficisto en iu ministerio, homo klera, monduma kaj pasie sindona al sia juna edzino, fiksitis silente la rigardon ien al la neĝaj koksoj de Vitoŝa. Evidente, li nek rigardis ion tie, nek estis okupita de ia difinita penso, ĉar lia vizaĝo havis la esprimon de tiu trankvila, senzorga distreco, kiu ekposedas nevole la homon, kiam lia animo estas trankvila, kiam lia vivo fluas facile kaj glate kaj kiam li, el varma ĉambro, vivigata de la ĉeesto de belega edzino kaj de l' gaja bruado de l' forno, rigardas ekstere la furioze bruegantajn blovadojn de l' vintro. Ĉiu estas travivinta tiun feliĉan-egoistan sonĝsimilan staton.



ARANKA SCHULHOF: Korto de bavara kamparano

La rigardo de lia edzino ankaŭ kuris eksteren de la ĉambro, sed ne tiel malproksimen kaj sencele. Ŝi estis ĝin direktinta malsupren al najbara korto. En la fundo de tiu ĉi korto estis duonruinigita dometo kun malalta kamentubo, kiu rigardis malĝoje al la ĉielo, sendante al ĝi varman fumon; el sub la pendanta kaj kurbiĝinta tegmento rigardetis fenestreto, kies tri rompitaĵoj estis anstataŭitaj de ĉifonoj, kaj antaŭ la sojlo de la malalta pordo estis amasiĝinta lavango. Tiu ĉi mizera dometo, kaŝita inter la grandaj riĉulaj domoj, similis al ĉifona almozulino, perdiĝinta inter amaso da feliĉaj kaj fieraj majoredzinoj. La simileco inter la dometo kaj almozulino ankoraŭ pligrandiĝis per la aspekto, kiun ĝi havis kvazaŭ etendinte manon al la ĉirkaŭaj grandegaj domoj, kaj dirante: „Kompaton, sendu al mi unu el viaj lignoj kaj mi pleniĝos je varmo; sendu al mi unu el viaj multekostaj ornamaĵoj kaj mi pleniĝos je ĝojo, eble ankaŭ je kanto tiun ĉi vesperon... Ĉu vi vidas?... Malmulton mi bezonas por esti dankema al Dio. Kompatu min!“

Sed la grandaj domoj silentas, ili estas senanimaj; kaj la feliĉaj homoj ne aŭdas (ho ve! la feliĉo havas tiun ĉi mankon — malakrigi la oreltambureton); la abunda bruado de l' forno ne lasas veni ĝis iliaj oreloj la akran kanton de la ventego en la truita domo de la malriĉulo. Verŝajne, S-ino Jordanov aŭdis tiun kanton, ĉar ŝia vizaĝo iom post iom kovriĝis per nuboj kaj subita kompato larmigis ŝiajn okulojn.

— Kompatinda Danĉovica, kiu scias, kiel ŝi fartas nun?... Ĉu vi vidas, Canko, nur ilia kamentubo ne fumas — diris ŝi meditante al sia edzo, ne levante la okulojn de la ĉifona fenestreto de l' mizera loĝejo.

Ŝia edzo malleviis tiam la rigardon de la pintoj de Vitoŝa kaj vigle ekrigardis la malriĉulan korton.

— La malriĉa, — ekparolis li — kaj krom tio kvin infanoj!... Kaj ĉiuj loĝas en tiu ĉambreto sen fajro. Se ŝia edzo estus viva, li subtenus ilin per sia malgranda salajro. Kaj nun, kiel ili fartas, mi prezentas al mi Vera!

— Dio, Dio, kial vi kreas malriĉulojn! — ekkriis nevole Vera, kaj sur ŝia vizaĝo pasis nova nubo de sincera malĝojo.

— Kaj diras iuj, ke ne ekzistas ĉe ni granda malriĉeco: kredeble tio ĉi estas dirita por senkulpigi sin, ke ne ekzistas ankaŭ kompatemo — rimarkigis Canko.

En tiu ĉi momento la ventego tiel furioze muĝis ekstere, ke la fenestroj ektremis. Vera neatendite ekkriis montrante la domon de Danĉovica. La ventego, per sia nevenkebla forto, estis elpuŝinta la ĉifonojn, kiuj ŝtopis la rompitaĵajn vitrojn de l' fenestro, kaj libere eniris en la malluman ĉambreon. Tio ĉi kaŭzis teruran tumulton en la ĉambro. La infanoj ekkriegis pro la ekmordo de la furioza malvarmego kaj tuj eliris eksteren, kovritaj preskaŭ per ĉifonoj, kaj la malgranduloj, nur en ĉemizetoj kaj forte plorantaj. Ĉiuj ekkuris tra la korto kaj kaŝiĝis sub la tegmento de forĝejo ĉe la alia rando de l' korto, kie la fajrejo mildigis iom la aeron. Nur la patrino restis en la ĉambro por ŝtopi tie la truojn. Ŝia malsanema kaj malgrasa vizaĝo videtiĝis tra ili kiel fantomo... Sed la ventego malheligis per neĝaj nuboj la aeron kaj malhelpis al la geedzoj rigardi la spektaklon.

Tiam ili turniĝis malantaŭen kaj iliaj rigardoj falis en ilian varmigitan ĉambron, riĉe ornamitan per bildoj en luksaj kadroj, kun pompaj lampoj metitaj sur juglandlignaj seĝetoj, kun silkaj kanapoj, multekostaj tapiŝoj, senutilaĵetoj, statuetoj. Tiu ĉi aspekto de ilia propra feliĉo kaj komforteco por momento konfuzigis iliajn animojn per sia kontrasto la unua... Sed baldaŭ la malbona humoro malfortiĝis, kaj ilia interparolo tuŝis alian temon. Kvazaŭ dika kurteno falis inter la feliĉa paro kaj la mondo de la malfeliĉuloj. Almenaŭ ĉe Vera oni povis vidi tiun trankviliĝon. Ŝi stariĝis pro io kaj,

pasinte preter la spegulo, ĵetis rapidan kaj feliĉan rigardon al la blanketita, ĉarma, ridetanta vizaĝeto, kiun ŝi vidis en la granda kristalo.

— *A propos*, mi estis forgesinta, sed kion vi faris pri la vesto? — vigle ŝi demandis sian edzon, kiu restis ĉiam ankoraŭ meditante.

— Kiu vesto?

— Kiel, ĉu vi forgesis? La balmantelo.

— Ah, la balmantelo! Vere mi forgesis...

— Bonega afero... Forgesis... Kiel originala vi estas, Canko! — diris Vera duonkolere, korektante sian tualeton.

Canko stariĝis kaj meditante komencis iradi en la ĉambro.

— Kaj ĉu vi aŭdas? — ree turniĝis Vera — iru en la modan magazenon de Sinjorino U. Tie mi vidis belegan balmantelon... brokato, mirindaĵo, belegeco!... Io sensimila!

— Sed ĝi estas saleta^[1], birdeto.

— Saleta? Centtridek frankoj! Tian mizeraĵon vi nomas saleta! Aŭ vi volas konfuzi min... Vi scias, ke ni estas invititaj je la balo ĉe X la trian tagon de Kristnasko, kaj necesa estas al mi la mantelo, kiel la aero, kiun mi spiras.

— Bonege, bonege.

— Ne estas sufiĉe nur, ke vi diru „bonege“, Canĉjo... Sed vi devas rapidi, por ke iu alia belulino ne aĉetu tiun superbelegan veston... Prezentu al vi, tio estus terura!

— Mi prezentas al mi.

„Pli terura ol la sceno, kiun ni vidis antaŭ malmulte da tempo“, volis ironie fini Canko, sed ne eldiris siajn vortojn.

Senpacience lin rigardis Vera.

— He?

— Aŭskultu, kara Vernjo... — komencis Canko kun serioza mieno.

Ŝi antaŭvidis, ke li faros kontraŭdirojn kaj decide interrompis lin.

— Mi ne volas „kara Vernjo“, la demando estas solvita.

— Vi scias, ke mi nenion rifuzis al vi, nenion, sed...

— Sen „sed“, Canêjo! — ekkriis Vera, karese vangofrapinte sian edzon kaj ravinte lin per la brilo de ŝia mirinda rideto — vi estus mem devinta al mi fari agrablan surprizon... Vi scias fari ilin en plej delikata maniero... Kaj se ne tiun ĉi veston, vi povas fari alion... Mi submetas min al via estetika gusto.

La vanta Vera evidente volis ekbrili per ia ekstera ornamo dum Kristnasko. Sen tiaĵo ŝajnis al ŝi, ke ŝi ne renkontos la feston dece.

— Bone, mi konsentas! — diris subite kun heligita vizaĝo Canko. — Mi faros al vi surprizon indan je vi, je via natura bona koro, je via nekomparebla kaj amanta animo.

— Donu la manon, *faisons la paix!* — diris Vera, preninte la dekstran manon de Canko kaj ĝin pacige skuinte.

Baldaŭ vesperiĝis. Vera estis en granda eksciteco la tutan tagon pro la surprizo preparata por ŝi. Ŝia imago jam de nun laboris por malkovri la sekreton de la surprizo, kaj tiu surprizo estos tre, treege ĝoja por ŝi: ŝi sciis ke kiam Canko promesas ion, li scipovas ĝin plenumi nobele. Kaj vere, ĉu tio estos la sensimila, la dia balmantelo, el la belega brakato, aŭ alia ornamaĵo — ora, juvela, brilanta? Sed ŝi nevole preferis la balmantelon. Kiel ravita ŝi estos! Kiel nobla estas tiu Canko!

Canka malfruis kaj ne revenis hejmen. Tio grandigadis la dolĉe-turmentan sopiron de Vera.

Tute vesperiĝis. Canko ne venis. La ventego kolerege muĝis ekstere en la densaj mallumoj. La fenestroj krakis pro ĝia furiozeco. Tiu malagrabla bruoj rememorigis al Vera la malriĉan Danĉovica'n kaj ŝiajn nudajn infanojn.

— La Sankta Vespero estas nun... Ili kuŝiĝas sen fajro, ili renkontas la Kristnaskon malsataj... Dio, Dio, kial vi kreis malriĉulojn? — ree murmuretis ŝi, kaj ŝia koro subite kaj dolore konvulsiis, kvazaŭ ia riproĉo de l' konscienco ŝin atakus...

Tiom da feliĉo apud tiom da malfeliĉo ekŝajnis al ŝi kiel krimo. Al ŝi fariĝis peze ĉe tiuj pensoj, ŝi sentis, ke ŝi estis kulpa antaŭ iu pri io, sed ŝi ne kuraĝis doni al si kalkulon pri tio, respondi al si kial ŝi estas maltrankvila, kaj en ŝi aperis nevola deziro dekliniĝi de tiuj pensoj, distriĝi per io alia: animo vanta, sed nature bona, malforta kaj impresebla, kia ŝi estis, ŝi sentis, ke ne estas bone, ke ŝi estu tiom feliĉa, dum en la mondo estas tiom da suferoj, ke ŝi devus nepre fari ion por tiuj ĉi suferoj, sed ŝi ne

havis kuraĝon, nek kutimon por sin trempi brave en tiun alian mondon de l' homa malfeliĉego. Ĉar ne sufiĉas havi deziron kaj eĉ havi eblecon por fari bonan — oni devas ankaŭ kuraĝi ĝin fari... Ĉar fari la bonon, kiel ĉiun luman agon, tio ĉi postulas certan dozon da braveco, preskaŭ heroecon... Nur la malbono estas farata facile kaj eĉ senkonscie, tial ankaŭ la regiono de ĝia regado ampleksas tutan mondon. Kaj Vera, sub la potenco de la pezaj pensoj, kiuj premis ŝian cerbon, kun nevola ĝojo aŭdis paŝojn, ke ili venas al la pordo. Ekĝojis ŝi pri la okazo, kiu venis por ŝin distri... Kredeble Canko alpaŝis kun sia brilanta donaco.

— Nepre la balmantelo estas! — ŝi diris al si, kaj ŝia koro ekbatis pro nova infana ravo. Ŝi saltis ekstare.

La pordo malfermiĝis. Anstataŭ Canko eniris Danĉovica kun siaj kvin infanoj. Vera ne povis ilin rekonigi! Ili estis en novaj vestoj, ĉiuj en varmaj peltetoj, ĝojaj kaj ridetantaj.

— Kisu, miaj karuletoj, la maneton de la sinjorino, — diris Danĉovica al siaj infanoj, kiuj unu post la alia viciĝis kisantante ŝian manon, sen tio, ke ŝi povus rekonsciiĝi pro konsterniĝo.

— Kio estas? kio estas? demandis Vera.

— Dio redonu ĝin al vi centoble kaj vin ĝojigu, kiel vi ĝojigis nin, sinjorino — diris Danĉovica larmokule. — Dankon al vi, ke vi kompatis nin kaj ne forgesis nin en la antaŭvespero de la Dia festotago... Dio kaj Sankta Dipatrino vin benu, pro ke vi vestis nin kaj ke vi sendis al ni veturilon da lignoj kaj manĝaĵon, por ke ni povu renkonti la Kristnaskon. Nun ni ankaŭ kredas, ke Dio naskiĝas... Kisu, kisu, karuletoj, la manon de la sinjorino!

Vera malfermis la buŝon pro miro. Ŝi mem estis kortuŝita ĝis larmoj, sed ŝi ne povis klarigi al si, kion signifas tiuj benoj kaj dankoj de Danĉovica.

— Kredeble vi eraras, junedzino Danĉovica... — ŝi diris vigle.

Sed en la sama momento la pordo malfermiĝis kaj tie aperis la ridetanta vizaĝo de ŝia edzo, kiu haltis kaj ĵetis feliĉan rigardon al la kortuŝa sceno, kiun li mem estis delikate preparinta.

Vera konjektis: ĉi tio estis la surprizo! Ŝi kuris al Canko larmokule kaj lin kisis surfrunte per sonanta, longa kaj karesa kiso.

Tiu ĉi kiso estis la plej pura, la plej nobla, la plej feliĉiga per kiu edzo estis dotata de sia edzino.

El la bulgara, kun speciala permeso de l' aŭtoro:
IVAN H. KRESTANOFF, L. K.

[1]En senco de tre multekosta. (*Rim. de l' trad.*)

PRI KELKAJ FAKTOROJ DE LA NUNTEMPA RUSA ARTO



N. HOHLOV

DED. AL J. BAGHY

Kvazaŭ terura paroksismo, la revolucioj haltigis por kelka tempo la tutan normalan fluon de pensoj, de laboro kaj vivo en Rusujo. La lando kvazaŭ izoliĝis de la tuta mondo, perdis la lastajn ligilojn kun ĝi, kaj restinte izolita, sub la influo de la unika politika fermento en sia organismo, per malrapidaj, propraj paŝoj ĝi ektransiris al nova, malfacile ankoraŭ konturebla socia kaj mensa vivo. Kvankam la mondo teruriĝis pro tiu bildo de sanga transformo, kaj ĝi, timante la malsaniĝon, ĉirkaŭis Rusujon per fera ringo, — tamen la mondo ankaŭ ekdeziris pli profunde konatiĝi kun la kialoj de la katastrofo kaj kun la vizaĝo kaj animo de la malsana giganto. Tiuj, kiuj volis nur satigi sian sci-avidon, eklegis la priskribojn de la aventuroj, kun kiuj kuraĝaj eŭropanoj faris siajn vojaĝojn tra nova Rusujo, la raportojn pri iliaj vizitoj al urboj, vilaĝoj kaj eĉ al la regantoj de la lando; eklegis ĉion, kion oni diras kaj skribas pri ĉi tiu lando en gazetoj kaj en la moderna literaturo tutmonda. Sed ekzistas aliaj homoj, kiuj volas fakte kompreni la animon de la nova Rusujo, ĝian efektivan ĝeneralan vizaĝon, ĝiajn karakterajn trajtojn kaj celadojn. Por tiuj homoj restis la sola kaj certa vojo: konatiĝi kun la rusa literaturo, rusa arto, ekstudi ilin kaj el ili lerni ion. Ekzistas multaj, kiuj komencas la studon ĉe la malnovaj tempoj, kaj paŝon post paŝo, per certaj vojoj ili penetras en la rusan koron. Ekzistas aliaj, — la plimulto — kiuj ne havas tempon por fari tian profundan studon, kaj ili simple prenas la verkojn de Turgenev, Puŝkin, Dostojevskij, Tolstoj, Ĉeĥov, Gorkij, ili deĉifras por si la muzikon de Glinka, Rubinŝtejn, Ĉajkovskij, Rimskij-Korsakov, Glazunov, Skrjabin; ili vizitis la

spektaklojn de la Moskva Arta Teatro, la dancojn de la rusa baletto, la artajn ekspoziciojn de rusaj pentristoj kaj skulptistoj. Tiu vojo estas ankaŭ bona, kaj se ĝin akompanas sincera deziro ekkoni Rusujon, ĝi neniam restas sen rezulto. Kurteno post kurteno falas antaŭ la esplora rigardo, kaj la vivo de la lando fariĝas pli kaj pli klara, ĝia fizionomio perdas sian fremdecon kaj ĝia animo la strangecon. Sed ekzistas aparta tendenco inter tiuj studoj. Kelkaj preferas ekkoni la puran rusan arton. Kiel floro de arbo unika kaj karakteriza, tiu ĉi floro de popola animo portas en si la kvintesencon de nacia genio, de nacia spirito. Por tiuj homoj, kiuj studas la puran rusan arton, ofte restas nekonataj la geografia situo de la lando, ĝia topografio, ĝiaj komerca kaj industria statistikoj, la datoj de ĝenerala historio, kaj tamen ili povos fiera diri, ke ili konas la landon, konas ĝian animon. Tiu krio de l' animo, kreaĵo, kiu kondukas la homan intelekton pli kaj pli malproksimen de la aktuala mizera monda materialismo kaj pli proksimen al la koro de la granda Nekonato — ĝi servu por ni kiel ŝlosilo por vere malfermi la fremdajn ŝajne pordojn, kiuj poste bonvene malfermiĝas kaj donas novan ĝuon, novan inspiron.


Celo de tiu ĉi artikolo estas ĝuste montri al la explorema fremdlanda artamanto tiujn faktorojn de la nuntempa pura rusa arto, kiuj — kvankam elektitaj laŭ la personaj plaĉo kaj inklino de la skribanto — povas kaj devas servi kiel gvidiloj, ĉar pro siaj grandaj influo, talento kaj signifo, ili ĉial estas studindaj kaj ili ĉial restos eternaj monumentoj en la historio de nacia arto. Ne estos do strange, se mi, komencante paroli pri la nuntempa rusa literaturo, tuj haltas antaŭ la verkoj de Aleksandro Blok, tiu titano, kies grandecon ankoraŭ plene ne komprenis lia naskolando mem kaj kiuj oni amos kaj studos en multaj pluaj dekjaroj kaj jarcentoj. De l' tempo de Puŝkin, rusa muzo al neniuj donis tian belecon, ĉarmon kaj forton de parolo ol al Blok, neniam post Puŝkin ies vortoj portis tiom da pura profeteco kaj profeta simbolismo. Mirinda estas la misio de tiuj du homoj, aperintaj en diversaj tempoperiodoj, en diversaj politikaj situacioj. Ĉi tiuj misioj havas tiom oftajn paralelojn, ke per ili kvazaŭ identiĝas la kantoj de ili ambaŭ. La kantoj de Puŝkin, skribitaj en juna, kreata de la poeto rusa lingvo, kaj la lingvaj puntaĵoj de Blok — parolas pri la samo, tiom alta estas ilia nivelo, kiam ili tuŝas la plej kaŝitajn angulojn de la homa animo, la animon, eternan lingvon de la naturo. Iliaj serĉadoj ankaŭ estas eternaj kaj ili kondukas al revelacioj. La elekto de vortoj portas sur si la stampon de ĉiela muziko, hipnotigas. Feliĉe ni havas en nia Esperanta literaturo multajn tradukojn el Puŝkin, sed ni preskaŭ tute ne havas tiujn de Blok. Sed certe tio restos nur demando de tempo, kaj la Esperantistoj ankoraŭ havos la ĝuon konatiĝi kun la lasta poeto pere de nia gracia lingvo.

Kio estas plej karakteriza por Blok? Estas: lia animo de geniulo, kiu donas al liaj vortoj superhoman, magian ĉarmon. Kaj li scias sian forton, siajn kapablojn, li uzas ilin kiel mirindan dian instrumenton, tiu Blok, flagranta de pasio, luksa, petola, voluptema kaj ĉerpanta sian forton el nekonata por aliaj fonto. Li konas sin mem kaj

sian destinon. Parolante pri Puŝkin, pri sia amata poeto, en la Domo de la literaturistoj en Petrogrado, li efektive parolis pri si mem, kiam li diris: „Puŝkin estas poeto — la kanto senŝanĝa, eterna. Povas fariĝi malnovaj, neuzeblaj lia lingvo, lia maniero de parolo, sed la esenco de liaj verkoj neniam malnoviĝos.“ En kio tamen vidas Blok la eternecon de Puŝkin? En tio, ke li opinias Puŝkin’on vera poeto. „Kio estas poeto?“ denove demandas Blok. „Ĉu homo kiu nur skribas versojn? Certe ne. Li nomiĝas poeto ne tial ĉar li skribas versojn, sed ĉar li skribas per versoj, tio estas: faras harmonion el sonoj kaj vortoj — ĉar li estas filo de la harmonio: poeto.“ Iom komplika, tiu formulo fariĝas simpla, kiam Blok klarigas: „Kio estas la harmonio? Estas la konkordo de la mondaj elementoj, la ordo de la monda vivo. Tiel aperas la antitezo: ‘ordo — kosmoso, kaj malordo — ĥaoso’; la lasta estas tute parenca al la unua, kiu el ĝi formiĝas. La unua tasko de la poeto — el tri por li nepre devigaj — estas liberigi la vortojn el tiu senforma, senkomenca, senfina elemento (ĥaoso), en kiu ili neŭtrale restadas. La dua tasko estas ordigi tiujn rabitajn de ĥaoso sonojn kaj fari el ili harmonion, doni al ili formon. La tria tasko estas enkonduki, porti tiun harmonion en la eksteran mondon. Forrabitaj de la elemento kaj harmoniigitaj kaj enportitaj en la mondon, la vortoj komencas per si mem fari sian aferon. La vortoj de la poeto estas samtempe liaj verkoj. „Kaj ne estas eble“, diras Blok, „kontraŭstari al la forto de la harmonio, kiun la poeto ĵetas en la mondon. Tiuj, kiuj ne volas tion kompreni, estas kondamnitaj per la nigra nomo: popolamaso. Se Puŝkin pereis de la duela kuglo de Dantes, tio estas okazo ekstera: efektive lin mortigis tiu ‘burokrata kaj aristokrata popolamaso’, kiu ĉirkaŭis la poeton kaj formis la regantan, premantan klason en la Rusujo samtempa al Puŝkin, kun la karakterizaj por tiu klaso intrigoj kaj moraloj, kiujn ne povis elporti Puŝkin, parolinta en siaj lastaj tagoj:

...Jam venas mia temp’Kaj koro pacon petas...

En la lastaj versoj, en la antaŭmortaj elspiroj, Puŝkin revis pri ‘paco kaj libero’. „Sed“, diras Blok, „la pacon kaj liberon oni ankaŭ forprenas, eĉ ne la eksteran pacon, sed la pacon de la kreo. Ne la infanan liberon, nek la liberon de politika liberalismo, sed la kreantan liberon, la sekretan liberon de l’ animo. Kaj la poeto mortas, ĉar li ne havas jam aeron por spiri, kaj lia vivo perdas la sencon.“



ATTILA SASSY: SEPVUALA DANCO

La vortoj — tiom profunde memprofetaj — montras, kian tragedion travivis Blok antaŭ sia devigita morto, en la reĝimo, kiu per sia bruta, venĝa materialismo kaj pure teraj tendencoj mortigis lin. Li devis elekti en la dilemo ĉu „Ars longa vita brevis“ aŭ la evangelio de Karl Marx, kiu traktas nur pri kaj por la dua parto de la latina proverbo. Li sufokiĝis kaj lia morto staros kiel plej nigra malbeno al tiuj liaj samtempuloj kiuj povis, sed ne volis subteni la fajron de eterna lumo, brulanta en tiu granda talentulo.

La leganto do komprenas nun, kiel la paraleloj en la vivo de Puŝkin kaj Blok kvazaŭ ligas ilin, kaj neniuj skizoj pri Blok estus klara sen aludo al Puŝkin, en kies granda fonto sin banis la animo de Blok kaj kies juvelojn li facetis kun majstra beleco, estante mem grandulo; kaj nur akcentante per tiu laboro pri sia antaŭulo sian heredan gloran destinon.

Pri kio skribis Blok? Li skribis pri ĉio, kien penetris lia rigardo, liaj sentoj, lia penso kaj fantazio. Kaj ili penetris en la plej profundajn sekretojn de la vivo kaj portis al ni de tie, kvazaŭ el minejo, ĉiam novajn kaj freŝajn leĝojn, lumon, vokon kaj revelaciojn.

Do, studi la modernan rusan arton kaj ne konatiĝi kun Blok — estus tia eraro, kiel veni al Parizo kaj ne vidi la turon de Eiffel. El tiu komparo ankaŭ evidentiĝas, ke simila eraro estas preskaŭ neebla.

Al la plej famaj verkoj de Blok apartenas lia „Dekduo“, jam tradukita en multajn eŭropajn lingvojn, sed certe preskaŭ ĉion perdante en la traduko.

Dezirinte priskribi la tutan ciklon de la rusa revolucio, Blok ne elektis la literaturan lingvon, nek ian modernigitan lingvaĵon, sed prenis la parolan, simplan lingvon de amaso. Oni do povas imagi, kian miraklon kreis el ĝi Blok! Tiu lingvo, kvazaŭ nefacetita ankoraŭ diamanto, sub lia facetadilo subite ekbrilis per nekomparebla, originala, natura beleco. Sola tiu eksperimento faras el Blok kreanton de epoko. Kaj lia percepto pri la revolucioj estas, en tiu ĉi verko, tute alia ol la percepto de la plimulto el liaj samtempuloj. En la bildo de Kristo, akceptanta la ofendojn, batojn, sed ilin neniam timanta, li vidis tiun kontraŭvenenilon, kiu povus kuraci la animon de la malsana popolo. Homoj, harditaj sub la batoj, sub la nemerititaj batoj de l' sorto, kontraŭmetintaj al tiuj batoj sian amon, indulgon kaj forgeson — jen estas la eliro, jen la apoteozo. La harmonio, la amo venkos la ĥaoson, la revolucion. Tiu harmonio, la amo, kiun predikis Blok, estas ja samtempe ankaŭ la stimulo de nia movado. Li apartenas ankaŭ al ni, la monda kvanto. Liaj paroloj faras honoron al la tuta homaro, el ili povus ĉerpi la homoj de blanka, flava, nigra aŭ ruĝa haŭto, kaj Esperanto, tiu perfekta kunigilo de l' homaro, certe taŭgus por helpi ĉi tiun celon pli perfekte ol iaj naciaj lingvoj.

*

La alia giganto de la rusa arto, de l' arto pentra estas M. Vrubel, mirakla estaĵo, veninta sur sian artistan vojon per kaŝitaj paŝoj de esplorado, lumiginta la ĉielon kiel unuaranga ĉiela astro kaj foririnta de ĝi en la mistikan mondon de frenezo kaj blindeco. En la pentrarto de Vrubel estas videbla la stranga, ŝtoniĝinta penso. Kvazaŭ ĉeestinto de grandaj geologiaj mondaj kataklismoj, li ĉion vestas, dekoracias per la mantelo de tiamaj rokoj kaj ŝtonoj. Lia penso kvazaŭ suprenlevas la tavolon de la tera ŝelo, el post kiu li volas trovi, elfosi ian fikspensan sekreton, kaj masonas montojn ĉirkaŭ la ĉefa temobjekto de siaj pentraĵoj. Tiun fortikecon de ŝtonoj li donas ĉiam eĉ al la herooj de siaj bildoj, aŭ metante grandan rokon kaj ĉizante el ĝi la rusan „bogatiron“ (fortulon, mezepokan kavaliron), aŭ ebrian de gajeco Pan'on; aŭ prenante delikatan marmoron por la figuro de doloranta, ploranta Dipatrino en la Vladimir'a katedralo de Kiev. Liaj pentraĵoj ne estas lingvo homa; en ili parolas la mineraloj, fajranta, primitiva elemento, malmoliĝinta en juvelojn.



RÉVÉSZ: Fino de Septembro

Scienco de magio donas al la juveloj grandan forton. Per sorĉaj paroloj la magoj scias preni el la animo de juvelo ian mirindan forton, faras el ĝi amuleton. Kaj la esplora animo de Vrubel sciis tiun magian lingvon de la juveloj kaj mineraloj, kiujn li alportadis el la alia mondo, de altaĵoj atingeblaj nur por la flugiloj de kondamnita Anĝelo. Vrubel sentis tro mallarĝa la tolon por pentri sur ĝi. Li bezonis surpentri, dekoracii templojn, grandajn monumentojn. Lia animo ĉiam estis serĉanta, deziranta atingi la perfektan belecon, kvazaŭ tra ponto, pere de la akcepto de Demona beleco. En liaj serĉadoj kvazaŭ gravuriĝis la fama sentenco de Dostojevskij: „Terure estas, ke la beleco estas ne nur afero timiga, sed ankaŭ mistika; en ĝi Diablo batalas kontraŭ Dio kaj la areno de batalo estas homaj koroj.“ Tiu senalterna penso: atingi la belecon, akceptinte en la animon la tutan abismon de Demona spirito, fariĝis lia dumviva deliro kaj fine alkondukis lin al la anima malsano. Tiu imago de Demona figuro faris ĉe la pentristo ankaŭ sian evolucion. Lia unua „Sidanta Demono“ de 1890-a kaj la Demono de la lastaj tagoj (1907) havas diferencon grandan. Dum la unua aperigas la tutan forton de malluma potenco, junan, fortmuskolan, arogantan, la dua montras jam la korupcion, krimecon de la animo de falinta Spirito, sur kies lipoj, kiel venena floro, krustiĝas la postsignoj de voluptaj, nehomaj kisoj, la stampo de senmezura orgio.

Notinde estas, ke Vrubel eĉ ne finis la akademion kaj lasis ĝin post kvarjara studado for. En la akademio li estis kiel specialisto-desegnisto, arto al kiu Vrubel preskaŭ neniam revenis poste. Li ne estas hodiaŭ-data artisto. (Lia lasta pentraĵo estas datita en 1910, post kio li freneziĝis.) Sed kompreni, profunde kompreni lin oni komencis nur nun, en niaj tagoj. Li instruis dekoracii laŭ sia propra metodo, kiun multaj komparas al kubismo, sed kun kiu ĝi laŭsence havas nenion komunan, kaj lia leciono portis en si grandan, propran originalecon. Mirindaj, preskaŭ timigaj estas la okuloj sur ĉiuj laboroj de Vrubel. Tiajn okulojn, unikajn, oni renkontas malofte sur la tolo. Kaj ŝajnas, ke el ĉiu tia okulo ŝprucas al ni la mistero, sekreto, kiun la pentristo forportis kun si kun la penso nek eldirita, nek des pli elpentrita.

El la verkoj de Vrubel estas plej konataj: „Bogatiro“, „Supertomba ploro“, „La juĝo de Pariso“, „Carino-cigno“, „Princino-Revo“, „Mikula Seljaninoviĉ“ kaj tri „Demonoj“; krom tio al lia peniko apartenas la laboroj en kelkaj katedraloj kaj preĝejoj, precipe en tiu de la cirila monaĥejo apud Kiev.

*

Se ni nun transiros al la muziko, ni trovos la kampon, kie oni pli ol ie ajn aliloke povus esti internacie komprenata; laŭ la senco mem de tiu arto. Nota lingvo de muziko — kvazaŭ la prototipo de nia Esperanto — permesas eĉ al verkoj kreitaj en pure naciaj kondiĉoj fariĝi kompreneblaj por la alinaciuloj, certe pli ol malpli profunde ol la aŭtoro tion dezirus.

Du rusaj nomoj estas plej ofte ripetataj nun alilande, kiel la plej brilaj reprezentantoj de la rusa muziko. Tiuj nomoj estas: Skrjabin kaj Stravinskij. Malfacile estas trovi talentojn tiom malsamajn, verkojn pli kontraŭajn, ol la verkoj de tiuj du komponistoj.

Muziko, vice kun danco, ŝajnas esti la memsufiĉa, „sencela arto“. Ilin ambaŭ kuniganta esenco — la ritmo — prezentiĝas kiel perfekte neŭtrala, abstrakta aĵo, sendependa de la konscio de l' kreanto. Ritmigita movo, transporto de ritmo en la spacon estas la embrio de danco, ritmigita sono estas la embrio de la muziko. Sonanta materialigo de ritmo estas la muziko, kiu atingis en niaj tagoj plej subtilan delikatecon, aperigas eksterordinaran, ekstazigan potencon, entenatan de du ĝiaj elementoj — sono kaj ritmo.

Tiu ĉi hipnotiga, mistika forto, enmetita en la sonritman esencon de la muziko, konsistigas la spiriton de la kreo de Skrjabin. Skrjabin kiel muzikisto ne estas apartigebla de Skrjabin la homo. Se oni iam aplikos la sentencon de Schopenhauer, kiu difinas la muzikon kiel senperan esprimon de volo, ĝuste tiun difinon oni devas apliki al la verkoj de Skrjabin. Tuta Skrjabin dronis en mistika, religia, streĉa celado. Tuta lia vivo estis kvazaŭ serĉo de eliro en la aliajn mondojn. La muziko neniel estis, nek povis esti por Skrjabin la celo mem, ĝi estis nur rimedo plej potenca por atingi aliajn celojn, por kiuj li ne trovis la vortojn en lingvo. Muzika penso anstataŭis por li la person diskutan, la sonoj — vortojn kaj frazojn. La muziko de Skrjabin estas ĉiam nur lirika. Muzika eposo, „pentro“ estas por li nekonataj, same mankas al li la „objekteco“. Skrjabin en la muziko ludas rolon iom komunan kun la rolo de Dostojevskij en la literaturo, pro lia streĉa direktiĝo al celoj, kiuj solaj havas por li la absolutan valoron.

Tute kontraŭa al li estas Stravinskij. La personecon de Stravinskij malfacile estas trovi en liaj verkoj. Muziko prezentiĝas al li kiel sia propra mondo, en kiu la objektoj havas ĉiu sian apartan koloron. Stravinskij estas subiĝinta al la muzika elemento, sed majstre

posedante ĝiajn leĝojn, li restas majstro de la elemento pli granda ol li mem. Skrjabin konkeris la muzikon kaj per titana volstreĉo devigis la elementon servi al li, ne li eniĝis en la spacon de la muziko, sed ĝin li enkondukis en sian propran mondon. Majstreco de Stravinskij estas plej mirinda, sed *lia volo, li mem* en lia muziko ne estas videblaj.

Ankoraŭ kelkajn interesajn trajtojn de ili ambaŭ. Ŝajnas esti ke Stravinskij entute estas plenigita de rusa nacia spirito: li prenas la motivojn kaj kolorojn el nacia rusa fonto. Skrjabin neniam prenis la ultranaciajn rusajn temojn, sed lia streĉa celado faras lin rusa laŭsence, dum Stravinskij estas plimulte eŭropano. Tial la lasta, kvankam ne tiel multe konata kiel Skrjabin fariĝas en Eŭropo pli bonvena, dank' al lia komprenebleco, dum la gigantaj verkoj de Skrjabin malofte trovas ĝustajn kaj bone lin kompreni kapablajn aŭditorojn.

*

Kvar nomoj el la centoj da ili — kaj jam ili brilas kiel kronaj juveloj sufiĉaj por glorigi unu apartan nacion. Ni ne tuŝis ankoraŭ rusajn teatron, baletan, popolan arton. Pristudi ĉion estas granda laboro, la homa vivo por tio ne sufiĉas. Kaj tamen ne estas eble ne studi tiun senfinan trezorejon de homa spirito — la rusan arton, — ĉar la studado mem fariĝas ĝuo kaj aparta, delikata feliĉo.

RAKONTO PRI KIŜ^[2]

JACK LONDON

Kiŝ vivadis antaŭ longe apud la bordo de l' polusa maro. Li estis ĉefulo en sia vilaĝo, kaj mortinte, li estis honorata, kaj lia nomo restis sur la lipoj de la homoj. Li vivis en tiel malproksima tempo, ke nur la maljunuloj memoris lian nomon kaj la rakonton, kiujn la prapatroj postlasis al ili. Ankaŭ la venontaj maljunuloj, siavice, same faros al siaj idoj ĝis la tempfino. Kaj estis dum la vintra mallumo, kiam la nordvento blovegas tra la glaciebenaĵo kaj la aero pleniĝas per fluganta blankaĵo tiel, ke neniuj kuraĝas eliri, kiam oni rakontis, kiamaniere Kiŝ sukcesis sin levi el la plej humila „igluo“^[3] de la vilaĝo, ĝis fine li fariĝis la ĉefulo super ĉiuj.

Oni diras, ke li estis inteligenta knabo, sana kaj forta, kaj estis vidinta dektri sunojn. Tiamaniere oni mezuris la tempon tiutempe, ĉar dum ĉiu vintro la suno forlasas la landon, kaj en la venonta jaro aperas nova suno por ke la homoj povu ree varmiĝi kaj rigardi reciproke la vizaĝojn. La patro de Kiŝ estis tre kuraĝa viro, sed li mortis dum tempo de malsatego, kiam li penis subteni la vivon de siaj kunuloj per mortigo de granda polusa urso. Pro tiu forta deziro li ekluktis kontraŭ ĝi, kaj liaj ostoj frakasiĝis.

Sed la urso havis multe da karno, kaj la homoj estis savitaj. Kiŝ estis lia sola filo, kaj post la morto de l' patro, Kiŝ kaj la patrino loĝis kune. Sed la homoj estis forgesemaj kaj forgesis la heroaĵojn de l' patro; kaj ĉar Kiŝ estis nur knabo kaj la patrino estis nur vidvino, ili ankaŭ estis forgesitaj, kaj baldaŭ loĝis en la plej humila el la „igluoj“.

Iun nokton, kiam la konsilantaro kunsidis en la granda „igluo“ de la ĉefulo Kloŝ-Kŭan, Kiŝ montris, kia sango trafluis siajn vejnojn kaj kiajn virajn kvalitojn li posedas. Kun kvazaŭ plenaĝula digno li leviĝis kaj atendis la ĉeson de la babilado.

— Estas vere, ke la viando estas porciita al mi kaj mia patrino, — li diris — sed ofte ĝi estas maljuna kaj malmola, kaj krome ĝi enhavas ekstreman kvanton da ostoj.

Ĉiuj ĉasistoj, grizharaj same kiel junaj, konsterniĝis. Neniam antaŭe aŭdiĝis io simila: knabo, kiu parolas kvazaŭ plenaĝulo kaj eldiras severaĵojn rekte al ili. Sed firme kaj serioze daŭrigis Kiŝ:

— Ĉar mi scias, ke mia patro Bok estis eminenta ĉasisto, tial mi parolas tiel. Oni diras, ke Bok havigis pli da viando ol du plej bonaj ĉasistoj; ke per siaj propraj manoj li disporciis ĝin; ke per siaj propraj okuloj li atentis, ke eĉ la plej humila maljunulo kaj maljunulino ricevu justan porcion.

— Na, na! — ekkriis la viroj — for la infanon! Enlitigu lin! Li ne estas viro, kiu rajtas paroli al viroj kaj grizbarbuloj!

Trankvile li atendis la ĉeson de la bruego.

— Vi havas edzinon, Ugh-Gluk, — li diris — kaj pro ŝi vi parolas. Kaj vi, Massuk, havas edzinon kaj patrinon, kaj pro ili vi parolas. Mia patrino havas neniun krom mi; pro tio mi parolas. Kiel mi antaŭe diris, kvankam mortis Bok, pro tio ke li ĉasis tro bone, tamen estas juste, ke mi, lia filo, kaj Ikiga, lia vidvino kaj mia patrino, havu sufiĉe da viando, kondiĉe, ke la gento havas abundan provizon... Mi, Kiŝ, filo de Bok, estas parolinta!

Li sidiĝis kaj aŭskultis vikle la fluegon de protesto kaj indigno, kiujn vekis liaj vortoj.

— Knabo parolas en konsilejo! — konsternite murmuris la maljuna Ugh-Gluk.

— Ĉu la infanetoj diras al ni, plenaĝuloj, kion ni devas fari? — demandis Massuk laŭtvoĉe. — Ĉu mi, plenaĝulo, estu mokata de ĉiu infano, kiu petaĉas viandon?

La kolero bolis treege. Ili ordonis, ke li enlitiĝu, minacis, ke li havos nenian viandon, ke li estos batata pro lia aroganteco. La okuloj de Kiŝ ekbrilis kaj la sango ekpulsis sub lia haŭto. Dum ili riproĉis kaj mallaŭdis lin, li ekleviĝis.

— Aŭskultu min, vi, viroj — li kriis. — Mi ne parolos plu en tiu ĉi konsilejo, ĝis kiam la plenaĝuloj venos al mi kaj diros: „Estas ĝuste, Kiŝ, ke vi parolu; estas ĝuste, kaj ni tion volas,“ Jen al vi, plenaĝuloj, mia lasta vorto. Bok, mia patro, estis eminenta ĉasisto. Ankaŭ mi, lia filo, iros kaj ĉasos la viandon, kiun mi manĝos. Kaj sciu, ke tio, kion mi kaptos estos juste disporciita, kaj nek vidvino, nek malfortulo ploros nokte pro tio, ke mankas manĝaĵo, dum la fortuloj ĝemas dolore pro la trosateco. Kaj en la venontaj tagoj hontos la fortuloj, kiuj estas tro multe manĝintaj. Mi, Kiŝ diris ĉi tion.

Mokoj kaj ridaĉoj sekvis lin, sed kun neŝancelebla volo li foriris, sin turnante nek dekstren, nek maldekstren.

La sekvintan tagon li iris laŭlonge de la bordo, kie renkontiĝas la tero kaj la glacio. Tiuj, kiuj rigardis lin dum lia foriro, vidis, ke li kunportas sian pafarkon kaj sufiĉe grandan provizon de ostpintaj sagoj. Ili ankaŭ vidis, ke surŝultre li portas la longan ĉaslancon de sia patro. Estis ridado kaj multe da babilado pri la neniam antaŭe vidita okazo. Neniam knaboj tiel junaj foriris por ĉasi; kaj ĉi tiu iris sola! Kaj ili kapbalancis kaj murmuris kvazaŭ profete, kaj la virinoj komplete rigardis Ikiga'n, kaj la vizaĝo de Ikiga estis serioza kaj malĝoja.

— Li revenos post nelonga tempo — ili diris kuraĝige.

— Li iru; per tio li havos bonan lecionon, — diris la ĉasistoj — kaj li revenos baldaŭ kaj li fariĝos humila kaj malfanfara por ĉiam.

Sed pasis tago; pasis du tagoj. Kaj je la tria blovis ventego, kaj Kiŝ ankoraŭ forestis. Ikiga ŝiris al si la harojn kaj sur la vizaĝon ŝi ŝmiris fulgon de fokoleo por montri sian ĉagrenon. Kaj la virinoj riproĉis la virojn per maldolĉaj vortoj pro tio, ke ili estis malbontraktintaj la knabon kaj kaŭzis per tio lian morton. Kaj la viroj nenion respondis, sed intencis serĉi la kadavron, post kiam la ventego trankviliĝos.

Tamen, la sekvintan tagon, frumatene, marŝis Kiŝ en la vilaĝon. Sed ne honteme li venis. Surŝultre li portis ŝarĝon da viando ĵus akirita. Kaj fiere li marŝis, kaj arogante li parolis.

— Iru vi, plenaĝuloj, kun hundoj kaj glitveturiloj, kaj laŭiru la vojon, kiun mi tramarŝis dum preskaŭ unu tago — li diris. — Estas sur la glacio multe da viando, ursino kaj du duonkreskintaj ursidoj.

Ikiga treege ĝojis, sed per virsimila mieno li akceptis ŝiajn karesojn, dirante:

— Venu, Ikiga, ni manĝu. Kaj poste mi dormos, ĉar mi laciĝis.

Tion dirante, li eniris la „igluon“ kaj manĝis ĝis sato, kaj dormis dudek horojn.

Tiam estiĝis granda dubo — dubo kaj diskutado. Mortigi polusan urson estas faro tre danĝera, sed multoble pli danĝere estas mortigi ursinon kun idoj. La plenaĝuloj ne povis kredi, ke la knabo, tute sola, povis fari tian mirindaĵon. Sed la virinoj atestis pri la freŝa viando, kiun li alportis surdorse, kaj ĉi tiu estis nerefutebla aserto. Fine do ili foriris, plendante, ke tre kredeble, eĉ se li vere mortigis la urson, li certe ne distranĉis la kadavron. En la nordlando estas tre necese, ke tio okazu tuj post mortigo. Alie la karno tiel frostiĝas, ke, provante tranĉi, oni difektas la plej akran tranĉilon, kaj urson pezan je tricent funtoj oni ne facile metas sur glitveturilon por ĝin treni tra la malebena glaciaĵo. Sed veninte al la loko, ili trovis ne nur la kadavron (pri kiu ili dubis), sed ankaŭ tion, ke Kiŝ estis distranĉinta la korpon laŭ la maniero de lerta ĉasisto, kaj formetis la internaĵon. Tiel komenciĝis la mistero pri Kiŝ — mistero kiu konstante pliprofondiĝis. Je la dua ĉasiro, li mortigis junan ursan, preskaŭ plenkreskan, kaj je la tria, grandan virurson kaj ties kunulinon. Ĝenerale li forestis tri-kvar tagojn, sed kelkfoje li estis for dum tuta semajno sur la glacikampo. Ĉiuokaze li rifuzis akompanantojn, kaj la homoj miregis.

— Kiel li faras tion? — ili demandis sin. — Li eĉ ne kunhavas hundon, kaj hundo certe helpus lin.

— Kial vi ĉasas nenion krom ursoj? foje demandis lin Kloŝ-Kŭan.

Kaj Kiŝ taŭge respondis:

— Estas konata afero, ke urso havas la plej grandan kvanton da viando.

Sed oni parolis en la vilaĝo ankaŭ pri sorĉarto.

— Per la helpo de malbonaj spiritoj li ĉasas, — diris kelkaj — tial lia ĉasado sukcesas. Kiel ĝi ja sukcesus, se tio ne estus?

Aliaj diris:

— Eble tiuj spiritoj ne estas malbonaj. Oni scias, ke lia patro estis lerta ĉasisto. Ĉu ne estas eble, ke tiu helpas lin, por ke li fariĝu lerta, pacienca kaj vigla? Kiu scias?

Spite de ĉio, li daŭre sukcesis, kaj la malpli lertaj ĉasistoj ofte estis okupitaj per la alporto de la viando; kaj li disporciis ĝin laŭ justa maniero, kiel lia patro faris iam, antaŭe, tiel li ordonis, ke la plej humilaj maljunuloj kaj maljunulinoj ricevu justajn porciojn, kaj prenis por si mem nur tiom, kiom li bezonis. Kaj pro tiu justaĵo, kaj ĉar li estis tre lerta ĉasisto, oni rigardis lin kun respekto, eĉ kun solena timo. Oni ankaŭ proponis, ke li fariĝu ĉefulo post kiam la maljuna Kloŝ-Kŭan eksiĝos je la ofico. Pro liaj faroj la plenaĝuloj atendis lin reaperi en la konsilejo, sed li venis neniam plu, kaj ili hontis demandi pri tio.

— Mi pensas, ke mi konstruos por mi igluon, — iun tagon li diris al Kloŝ-Kŭan kaj kelkaj aliaj ĉasistoj. — Ĝi estos granda igluo, en kiu Ikiga kaj mi povos loĝi komforte. Ili kapjesis serioze.

— Sed al mi mankas la tempo. Mia afero estas la ĉasado, kaj per tiu laboro mi estas ĉiam okupita. Do estas juste, ke la vilaĝanoj, kiuj manĝas mian viandon, konstruu mian igluon.

Do la igluo estis konstruata laŭ grandaj mezuroj — laŭ pli grandaj ol la loĝejo de Kloŝ-Kŭan. Kiŝ kaj lia patrino translokiĝis en ĝin. Ĝis tiu tempo, depost la morto de Bok, Ikiga ĝuis nenian komforton. Kaj ne nur materian utilon ŝi havis; pro la alta stato, kiun ŝi atingis kaŭze de la mirindaĵoj de sia filo, oni rigardis ŝin la ĉefa virino en la tuta vilaĝo. Kaj la virinoj vizitis ŝin por peti ŝian konsilon, kaj poste citis ŝiajn saĝajn vortojn, kiam okazis disputoj inter ili aŭ kun la viroj.

Sed la mistero pri la mirinda ĉasado de Kiŝ, precipe okupis la mensojn de la vilaĝanoj. Kaj iun tagon Ugh-Gluk rekte akuzis lin pri sorĉarto.

— Oni asertas, — diris Ugh-Gluk, laŭ impona maniero — ke per la helpo de malbonaj spiritoj vi ĉasadas; per tio vi sukcesas.

— Ĉu la viando ne estas bona? — respondis Kiŝ — ĉu iu vilaĝano malsaniĝis post manĝo? Kiel vi scias, ke mi uzas la sorĉarton? Aŭ ĉu vi fariĝis kvazaŭ blinda pro la envio, kiu vin konsumas?

Kaj Ugh-Gluk retiris sin venkita, kaj la virinoj mokis lin. Sed iun nokton en la konsilejo, post longa diskutado, oni decidis spioni lin, kiam li foriros ĉasi, por ke oni sciu liajn metodojn. Do, je la sekvanta ĉasiro, Bim kaj Bon, du el la plej lertaj ĉasistoj, sekrete sekvis lin. Post kvin tagoj ili revenis kun okuloj alŝvelintaj kaj langoj tremantaj, kaj rakontis, kion ili vidis. La konsilantaro rapide kunvenis en la loĝejo de Kloŝ-Kŭan, kaj Bim komencis rakonti:

— Fratoj, kiel vi ordonis, ni marŝis malantaŭ Kiŝ, marŝis kaŝe por ke li ne sciu, kaj je la mezo de la unua tago li renkontis grandan virurson. Estis tre granda urso.

— Ne estas iu pli granda — Bon konfirmis kaj daŭrigis. — Sed la urso ne montris sin batalema, ĉar ĝi flankenturnis sin kaj iris malrapide tra la glaciaĵo. Tion ni vidis de la rokoj ĉe la marbordo, kaj la urso proksimiĝis al ni, kaj malantaŭ ĝi marŝis Kiŝ, tute sentime, kaj li kriis laŭtvoĉe, kaj svingis la brakojn kaj faris grandan bruon. Tiam la urso koleriĝis kaj ekstaris rekte sur la malantaŭaj kruroj kaj murmuregis. Sed Kiŝ marŝis ĝis li venis proksimen al la urso.

— Jes, — daŭrigis Bim — rekte ĝis la urso li marŝis, kaj la urso minacis lin kaj Kiŝ forkuris. Sed, kurante, li lasis fali etan pilkon sur la glacieron. Kaj la urso haltis kaj flaris, kaj poste englutis ĝin. Kaj Kiŝ, konstante kuris kaj faligis pilketojn, kaj la urso englutis ĉiujn.

La aŭskultantoj ekkriis kun dubo, kaj Ugh-Gluk malkaŝe esprimis sian malkredon.

— Per niaj propraj okuloj ni vidis tion — asertis Bim.

Kaj konfirmis Bon:

— Jes, per niaj propraj okuloj. Kaj tio daŭris, ĝis kiam la urso rekte ekstaris kaj blekegis pro doloro kaj freneze batadis per siaj antaŭaj piedoj. Kaj Kiŝ konstante kuris, ĝis kiam li atingis sendanĝeran lokon. Sed la urso malatentis lin, ĉar ĝin okupis la turmento kiun kaŭzis al ĝi la pilketoj en ĝia interno.

— Jes, ĝia interno, — interrompis Bim, — ĉar ĝi sin gratis kaj ĉirkaŭsaltis kiel ludema hundido; sed per ĝiaj krioj oni povus diveni, ke ĝi ne ludas, sed doloras. Neniam mi vidis tian spektaklon!

— Ne, neniam oni vidis tian, — daŭrigis Bon — kaj krome ĝi estis tiel granda urso!

— Sorĉarto — Ugh-Oluk supozis.

— Mi ne scias, — Bon respondis — mi rakontas nur tion, kion mi vidis. Kaj post mallonga tempo la urso malfortiĝis kaj laciĝis, ĉar ĝi estis tre peza, kaj estis saltinta tre forte, kaj ĝi iris for tra la glaciaĵo, balancante la kapon alflanke kaj multfoje sidiĝante por bleki kaj krii. Kaj Kiŝ postsekvis la urson, kaj ni postsekvis Kiŝ, kaj dum tiu tago kaj ankoraŭ dum tri tagoj ni sekvis lin. La urso malfortiĝis kaj senĉese blekis pro doloro.

— Ĝi estis ensorĉita! — ekkriis Ugh-Gluk. — Certe ĝi estis ensorĉita!

— Versajne.

Kaj Bim transprenis la parolon de Bon:

— La urso vagadis jen tien, jen ĉi tien, ĉirkaŭirante kaj reirante sian antaŭan vojon tiel, ke fine ĝi troviĝis tie, kie Kiŝ je la komenco renkontis ĝin. Nun la urso jam estis tute malsana kaj ne povis iri plu. Tial alproksimiĝis Kiŝ kaj mortpikis ĝin.

— Kaj poste? — demandis Kloŝ-Kŭan.

— Tiam ni forvenis, dum Kiŝ senhaŭtigis la urson, kaj ni kuris rapide al vi, por ke vi sciu pri la mortigo.

Kaj tiun tagon, posttagmeze, la virinoj hejmentrenis la viandon, dum la viroj kunsidis en la konsilejo. Kiam alvenis Kiŝ, ili invitis lin veni al la konsilejo, sed li respondis dirante, ke li malsatas kaj estas laca. Li ankaŭ diris, ke lia igluo estas granda kaj komforta kaj povas enhavi multajn homojn. Kaj tiel forte ili volis scii pri la okazintaĵoj, ke iris al la igluo de Kiŝ la tuta konsilantaro kun Kloŝ-Kŭan antaŭe. Kiŝ estis manĝanta, sed akceptis ilin kun respekto kaj sidigis ilin laŭ ilia rango. Ikiga montriĝis jen fiero, jen embarasita, sed Kiŝ estis tute trankvila. Kloŝ-Kŭan rerakontis la sciojn kiujn alportis al li Bim kaj Bon.

— Do ni deziras klarigon, ho Kiŝ, pri la maniero de via ĉasado. Ĉu vi uzas la sorĉarton?

Kiŝ levis la vizaĝon kaj ridetis.

— Ne, ho Kloŝ-Kŭan, ne konvenas, ke mi nura knabo, sciu ion pri sorĉistinoj, kaj pri tiuj mi nenion scias. Mi nur eltrovis rimedon, per kiu mi povas facile mortigi la glaciurson, jen ĉio! Tio estas „cerbarto“, ne „sorĉarto“.

— Kaj ĉu povas fari tion ĉiu homo?

— Ĉiu homo.

Estis longa silento. La viroj rigardis la vizaĝojn reciproke, kaj Kiŝ daŭrigis la manĝadon.

— Kaj... kaj... ĉu vi sciigos nin, ho Kiŝ? — fine demandis Kloŝ-Kŭan per tremanta voĉo.

— Jes, mi sciigos vin.

Kiŝ, suĉinte oston, leviĝis.

— Estas tute facile. Jen!

Li prenis maldikan pecon da balenosto kaj montris ĝin al ili. La pintoj estas tiel akraj kiel la kudriloj. Li zorge faldis la pecon da osto tiel, ke ĝi kaŝiĝis en lia mano. Tiam, subite, li lasis ĝin refleksiĝi. Li prenis pecon da graso.

— Jen! — li diris. — Oni prenas peceton da graso kaj faras en ĝi kavaĵon. Nun en la kavaĵon oni enmetas la balenoston rigide falditan kaj fiksas ĝin per alia peceto da graso. Poste, oni metas ĝin ekster la domon, kaj ĝi frostiĝas kiel pilko. La urso englutas la pilketon, la graso fluidiĝas, kaj la osto kun akraj pintoj streĉiĝas rekta. La urso malsaniĝas, kaj kiam la urso estas tre malsana, oni mortpikas ĝin. Estas tute simple.

Kaj Ugh-Gluk diris: „Oh!“ Kaj Kloŝ-Kŭan diris: „Ah!“ Kaj ĉiu diris ion laŭ sia propra maniero, kaj ĉiu komprenis.

Kaj tio estas la rakonto pri Kiŝ, kiu vivadis antaŭ longe sur la bordo de l' polusa maro. Ĉar li uzis „cerbarton“ kaj ne sorĉarton, li levis sin el la plej humila igluo, ĝis fine li fariĝis la ĉefulo de la vilaĝanoj, kaj, dum sia tuta vivo — oni diras — la gento prosperis, kaj nek vidvino, nek malfortulo laŭtploris dum la nokto pro manko de viando.

El la angla: E. H. COLLISON.

[2]Rekomendita de E. L. A.

[3]Loĝejo.

SONĜO DE LA MORTO

Dediĉata al S-ro Zanoni

Teruro furiozis sur la tero. Preminte sian plugilon en la animojn de la homoj, ĝi tranĉis profundajn sulkojn sur la fruntoj. Ĝi kuŝis sur la brusto de la naturo kaj diboĉante en sia veanta doloro, lasis post si mortvokan ĉagrenon.



Liniogravuraĵo de M. Kun

Ĝia neniiga torento frakasis ĉion. Al abismoj ĝi portis la kredon de la homoj, la revojn de la idealistoj. Per sia neimagebla pezo ĝi subpremis kaj mortigis ĉiujn burĝonojn de la progreso kaj amo, kaj poste ridegis kun mondoskuanta plorego.

*

La Morto forviŝis de sia falĉilo la gelatiniĝintan sangon. Kun transtera, rikana ironio ĝi rigardis per siaj okulkavoj al la finrikoltita kampo de la Vivo. Belega rikolto: la vivo de la homaro.

Ĉesis la Vivo kaj la Morto triumfis. Plenkontente ĝi kuŝiĝis por ripozi. La kraksonanta bruoj de la ostokorpa Pereoj nevidebla sonis timon vekante en la regno de la eterna mutejoj.

Ankoraŭ unufoje, ebriiĝinte de triumfo, ĝi explore rigardis ĉirkaŭen. Ĉu hazarde ne estas preterlasita io, el kiu nova vivo povus ekgermi? Ne! Ĉio mutas. Ne estas fantazio, kiu vidus sonĝojn; ne ekzistas batanta koro, en kiu povus naskiĝi aro da sentoj; ne estas krimo, kiu atendus kondamnon; ne estas juro, kiu soifas juĝofaron, kaj ne estas plu religio dion kreanta por si; ne estas dio, kiun per teraj ĉifonoj vestus la religio. Venkitaj eĉ la senmorteco kaj la eterna vivo, ĉar ne ekzistas mortonto, kiu kredus ilin. Ekzistas nur ĝi: la Morto.

*

Ĝi laciĝis kaj sopiris ripozon. Jen, en la regno de la eterna mutejoj subite, timeme eksonis ĉirpado de eta grilo. Kun sovaĝa furoro ĝi eksaltis kaj mutigis la adiaŭon de la iama glora vivo, kaj poste rikane ridegis... ridegis...

*

Rigardante al la ceteraj brilantaj mondoj de la universo, ĝi sentis kruelan ĝojon. Por nova rikolto estas ankoraŭ sufiĉe da materio sur la firmamento senlima.

Ĝi rigardis ilin aŭ nur ŝajne rigardis, ĉar griza, nebula vualo flugis antaŭ la okulkavojn. Ĝi ne povis diveni, kio estas tiu misteraĵo, kiu ĉiam pli kaj pli densiĝas, nigriĝas kaj malhelpas la vidon. Ĝi penis eksalti, sed ne povis. Kiel sorĉa plenpotenca sugesto prenis for tiu ĉi nova forto ĝian tutan energion?

*

Ĝi vidis jam nenion, kvazaŭ eĉ ĝi mem ĉesus ekzisti. Ankoraŭ ĝi faris senkonscian geston al la neniiga falĉilo, sed vane, ĉar venkis ĝin la lasta spiraĵo de la Vivo: la songon donanta dormo.

*

* *

Voĉo de miliardaj ĥoroj kun spiritmonda murmuro eĥis tra la etero.

— Vi povis neniigi la organismojn, sed vi ne estas reganto de animo. Tiu ĉi estas la plej potenca forto, pli potenca ol la penso, kiu estas nur ĝia infano.

La Morto kurbigis la senlipan buŝon je ironia rideto.

— Sensenca parolo. Kion valoras la forto sen organismo, kaj kion valoras la penso, se ĝi ne havas ilojn por krei.

— La volo de la animo estas senfina kaj ĝi fluas libere.

— Eĉ la senfina volo rompiĝas, se ĝi ne havas spacon. Kion povas fari la volo per la senfina Nenio?

— Nur la konscie moviĝantaj organismojn vi povis neniigi, sed la senmovaj tavoloj kaj libere vagantaj elementoj estas ekster via potenco. Vi ne havas forton kontraŭ la akvo, la fajro, kaj vi ne povas ordoni al la kureganta vento.

— Vere! Mi ne havas potencon kontraŭ ili, sed kion valoras la senmova mondo, kiu mankumas la konscion?

— Estos kreita la nova mondo! Estos donacita konscio al ĉiuj atomoj de la Tero, kaj se la penso donos flugilojn al la elementoj, tiam via potenco rompiĝos.

— Vi forgesas, ke la fajro, se ĝi ekkonscias, nur finos la taskon ĉesigitan de mi. Ĝi cindrigos ĉion.

— Kaj se tiel okazus, ankaŭ via estaĵo fariĝus ĝia viktimo. Venkita via senmorteco, vi neniigos.

La Morto, preninte la potencon falĉilon, furioze svingis ĝin ĉirkaŭ si.

La misteraj sonoj respondis per rido.

*

— Kiamaniere vi volas krei novan mondon? Kio estos tiu potenca forto, kiu povus disŝuti la semojn de la vivo sur la mortinta terglobo?



ATTILA SASSY: LA KULPO.

— Ekzistas forto, kiu havas potencon por tio.

— Kio do?

— La amo.

— Ĉu ekzistas vivanta koro, en kiu ĝi povas ekĝermi?

Kun ironia triumfo ridegis la Morto.

— Jes!... La koro de la tero.

— La koro de la tero?!

Kun terura furoro ĝi trapikis la terglobon per la falĉilo.

— Hahaha! Senfrukta estos la laboro kaj vana ĉiu penado! Donu do antaŭe vivon al la mortinta homaro!

— Sian militon faros la tero mem, kaj en tiu ĉi sankta aliformiĝo vi estos ĉesinta. Poste reviviĝos la miliardoj da homoj kaj komenciĝos la profetita eterna vivo: la transtomba edeno.

— Ĉu mi neniigōs? Mi, kiu estas naskita samtempe kun la Tero. Mi, kiu en ĉiu batalo de la Tero, en ĉiu metamorfozo havis la ĉefrolon? Neeble! Neeble!

— Mensogo!

Tondris voĉo, pro kiu la tero ektemis kaj la Morto terurite falis teren.

— Mensogo! La okan tagon de la kreado vi estiĝis, kiam Kain mortigis sian fraton Abel. Sole la penso de Kain estas vi, kiu prenis sur sin nevideblan ostokorpon. Vi kaŭzis la unuan doloran larmon kaj vi disŝutis la semojn de la funebra ĉagreno. Ne mi kreis vin, sed la ĉion neanta spirito de la Malbono.

*

— Kiu vi estas, potenca spirito, kiu jam per via ekparolo vekas timon en mi?

— Via ordonanta Sinjoro kaj reganto de la tuta universo: Dio.

— Dio? Ho ve al mi! Vi ekzistas do vere! Ne sole la religio naskis vin? Ĉu vere ekzistas vi, kies potencon mi ĉiam neis, kaj ĉu ankaŭ mi estus via sklavo, kiu ne konis suverenon super mi?

— Vere mi estas tiu!

— Se vi estas Dio, do vi estas la Justo mem, kaj mi estis nur blinda ilo en via potenca mano. Vi ne povas min puni pro kulpo de Kain, kiun vi mem kreis erarema kaj malforta!

— Vi estis blinda ilo de via propra memo, kiu estas senanima. Vi estas detruanta penso, kiu venenis la beston kaj la homon. Via tasko estas finita kaj la destino plenumiĝis, via senanima memo neniigōs.

La Morto, kun senespera veado, baraktis.

*

— Estu lumo!

Sonis la potenca voĉo kaj la Tero sopire ektremis. Ĝian nigran korpon ĉirkaŭprenis milda, fosfora lumo, kiu jen aperis jen malaperis. La lumo vagadis, ŝajne sencele, sed subite en la atmosfero de la Tero balancis sin violkolora vaporaĵo. Fendiĝis la Tero kun terura detonacio. La maroj forlasis la profundojn kaj unuiĝinte, preninte novan orbiton, kiel la ringego de Saturno, ili turnis sin ĉirkaŭ la Tero.

Bolis, ardis, fandiĝis kun surdiga bruego la giganta globo. Komenciĝis la lasta milito. Kie aperis la vaganta lumo, tie sekvis ĝin la violkolora vaporaĵo kaj la tavolo konsciiĝis. Veante furiozis la ventego kaj per sia uragana kolero vipis la ekkonsciintan fajron, kiu pasie ĉirkaŭplektis la Teron per flamantaj brakoj. Ŝajnis, ke ĝi cindrigos ĉion, sed en tiu momento bridis ĝian furoron la potenca akvoringego, kiu per tuta pezo subpremis la furioziĝantan elementon. Ĝi mole, kvazaŭ silke sternis sin kaj komplete vindis la Teron, laciĝintan pro la batalo. La Tero aspektis, kiel kolosa, nemezurebla akvoglobo, kiu kuregis en la spaco senfina.

Super la Tero, kiel giganta krisigno, ŝvebis la violkolora vaporaĵo: la lumo de la konscio.

La Morto ironie ekridegis.

— Ho granda Sinjoro! Finiĝis jam la unua tago de la kreado kaj tamen mi ekzistas!

*

La misterplena voĉo denove eksonis.

— Ekbatu la koro de la Tero kaj la tuto de la animoj okupu ĝin. La semo de la Amo ekĝermu en ĝi kaj kreifu per tio la nova firmamento! Estu!

Hela rozkolora lumo radiis super la akvoamaso. Saniga varmo penetris en korpon de la Tero. Ĉiu atomo ektremis pro nekonata fenomeno. La Tero enamiĝis la senliman spacon de la etero. Aromaj spirajoj flugis for el ĝia korpo kaj la Morto svenante apogis sin per la falĉilbastono.

La Spaco restis senmova. En ĝia glacia memo ne naskiĝis sentoj. La Tero ploris, faligis fajre brulantajn larmojn kaj el la larmogutoj fariĝis steloj, brilantaj meteoroj, vagantaj planedoj kaj kreiĝis — la nova firmamento.

— Potenca Sinjoro! Finiĝis jam la dua tago kaj tamen mi ekzistas.

*

— Evoluu la semo! Disiĝu la akvo kaj la tero, kiel estis antaŭe! Estu! Tuj, kvazaŭ je bato de sorĉovipo, la akvo per forfluo de tajdo okupis nur la profundaĵojn kaj egaj, senherbaj rokoj aperis zigzage ĉie. Iom post iom formiĝis maroj, lagoj, riveroj, riveretoj kaj vastaj kontinentoj etendis sin sur la Tero. La akvo estis diafane pura, sed la vastaj kontinentoj ankoraŭ etendis sin sen ornamoj.

— Potenca, ĉionreganta Sinjoro! Finiĝis jam la tria tago kaj tamen mi ekzistas. Ĉu vi indulgis min aŭ mi estas ekster via potenco?

— Mi povus neniigi vin, sed mi ne volas. Potenco via ĉesis. Kion valoras la intenco, se vi estas sen armilo?

— Ĉu sen armilo?

La Morto per subita gesto turnis sin al la falĉilo, sed ĝia ostobrakko vane serĉis ĝin. Dum momento ĝi ekstremitis, sed poste skuis ĝian tutan estaĵon raŭka, freneziga ridego. Minace ĝi levis la pugnojn.

— Ĉu sen armilo? Ĉu mi ne havas ankoraŭ manojn, kies nura tuŝo sufiĉas por ĉesigi la vivon? Ĉu mi ne povas spiri kaj mia spiraĵo ne estas jam tiom detrua, kiom ĝi estis antaŭe? Vi eraras granda Sinjoro, ĉar kien mi metos la piedojn, tie mi subpremos la semojn de la Vivo!

— Rigardu ĉirkaŭen! Ĉu vi ne vidas, ke la Tero ĉiam plimalgrandiĝas kaj la horizonto perdiĝas en la blua grizo de la malproksimo? Ĉu vi ne sentas, ke tio estas nur eta meteoro, sur kiu vi staras? Ĝi kuras, portante vin, en la senfina spaco. Mi povus neniigi vin, sed via porĉiama puno estas: vagadi sen potenco, vidante la eternan vivon sur miliardoj da Teroj.

La Morto venkita kun muta rezigno miris la Terglobon, ĉiam pli kaj pli malgrandiĝantan.

*

— Estu, kiel antaŭe estis, pompantaj kreskaĵoj, florodoro ŝvebu en la aero kaj ombro de verdantaj arboj ŝirmu ilin kontraŭ la sunradioj dum sekeco! Estu!

La marĉa humo ekmovis sin. Scivole aperis kapeto de la unua herbo kaj ĝin sekvis la dua. Ili klinis sin unu al alia per printempa kiso. Pro tiu ĉi kiso riĉe ekburĝonis la Tero.

Silka herbaĵo kovris la nudajn rokojn. Laŭbriĉaj arbaroj ornamis la dezertojn kaj multkoloraj floroj spiris ozonplenan aromon.

Jen, alvenis la eterna printempo, profetita de la ĉiam verda vinko.

*

— Reviviĝu la bestaro oceana kaj kontinenta! Miliardoj da birdoj flugadu gaje kantante! Estu!

Subite sonis timema ĉirpado de grilo. Je ĝia muziko vekiĝis mil kaj mil sonoj. La lazuroj de maroj kaj lagoj facile ektremis kun milda muĝado. La riveroj ekfluis kaj la riveretoj gaje plaŭdante rapidis inter la florornamitaj bordoj. La vento siblis melodion kaj birdpepadon ĉhis la prasilento.

En la aero aperis flugilhava monstro kun akra dentaro: la drako de la fabeloj. El la densejo de la arbaro kuregis mamutoj. El post arbetoj venis leonoj kaj inter la altaj herboj serpentumis boao. Iom post iom reviviĝis la tuta bestaro kaj komenciĝis malsovaĝa ludo anstataŭ lukto por la ekzisto.

*

— Reviviĝu la homo! Reviviĝu kaj havu la eternan vivon, promesitan post perdo de la paradizo! Estu!

Ĉio eksilentis. La naturo senmove atendis la renaskiĝon de la krono de ĉiuj kreitaĵoj. La suno varme kisadis per radioj la Teron. La floroj bonodoris parfumon el siaj kalikoj. La arboj donis pompajn kolorojn al la fruktoj kaj la bestaro silente kun muta pieco atendis.

Subite fendiĝis la tero kaj aperis sub du diktrunkaj pomarboj la unua homparo: Adamo kaj Evo.

*

Humile rampis al ili serpento. Rigardante ilin kun verdkoloraj, sed mildaj okuloj ĝi ĉirkaŭvolvis sin sur trunko de la arbo, kiu iam donis al ili la frukton de la scio.

Papilio flugis al ili. Ĝi frapetis la florpholvajn flugiletojn al la lipoj de Evo. Jen estis la unua kiso, vekanta el longa dormo al eterna vivo.

Evo ektremis. Honteme ŝi kaŝis per la rustoruĝaj haroj, ĝistere kreskintaj, sian mirinde belan nudecon. Ŝi ĉirkaŭrigardis kaj petole, sed kun ĉasta rideto, gracia alpremiĝo sin klinis al Adamo.

*

Adamo vekigis. Per siaj brile nigraj okuloj, kvazaŭ li volus finesplori sian animon, li rigardis la ĉarman, sindonan belecon.

Ekvidinte la serpenton, milde sibletantan al ili, li kaptis arbeton por elŝiri kaj mortbati ĝin. Li prenis la arbeton, sed lia forta premo ŝajnis esti nur ama kareso kaj li ne povis eĉ ekmovi ĝin. La brako senforte falis kaj li surprize vidis, ke la bestoj humile, kun kapoj al tero klinitaj, proksimiĝis al ili.

— Evo! Diru, kio estas? Ĉu vizio aŭ realo? Ĉu ankaŭ vin regas tiu ĉi sorĉo?

— Ni songis, Adamo.

— Ĉu vere ni songis? Ĉu ni songis la suferojn de miljaroj, kiujn kompreni nun mi ne povas? Ĉu mi songis min forta, potenca, kiu nun eĉ junan arbeton ne povas ekmovi? Ĉu mi estus songinta, ke mi manĝis el frukto de tiu ĉi arbo kaj per tio naskiĝis la unua kulpo? Kaj la frاتمortigo de Kain estas ankaŭ songo?

— Vere nur songo. Tie venas ja Kain kun Abel fratame brakumante unu la alian. Sur iliaj lipoj flirtas gaja rideto.

— Kaj la signo sur la frunto de Kain? Rigardu!

— Estis nur songo, turmenta, sed pasinta. Rigardu lian frunton! Ĝi estas pura, kiel la sennuba ĉielo. En liaj okuloj brilas senpekeco. Ili venas al ni.

— Ĉu ankaŭ vi songis la dolorojn de akuŝo kaj la ĝistomban ĉagrenon post perdo de Abel? Ĉu vi ne rememoras plu pri la suferoj dum la batalo por la vivo?

— Forgesite! Ĉio estis nur songo.

— Kaj kion vi sentas nun?

— Mi amas vin, eble pli arde ol hieraŭ, kiam la suno subiris.

— Hieraŭ! Strange! Ŝajnas al mi, kvazaŭ inter la hodiaŭ kaj hieraŭ estus pasintaj mil kaj mil jaroj. Jes! Jes! Rigardu ĉi besteton kaj tiun pepantan birdeton! Mi ne konas ilin. Kio estas iliaj nomoj?... Hieraŭ Kain vagadis ankoraŭ senhejme en la dezerto kaj Abel ne estis plu vivanta... Hieraŭ... Kiel strange! Mi ne komprenas... mi ne komprenas...

*

Li arde premis al si la alvenintan Abel, kiu per unu brako ankoraŭ tenis ĉe si sian fraton. Kun fila obeemo kisis Kain la frunton de Evo.

— Malbonaj knaboj! Kie vi forestis tiom longe? Dum la nokto vi estis tro malproksime de ni. Kie forestas mia filino, Heloa?

Ho, patrino! — komencis Kain. — Ni estis ne malproksime de vi por bani nin en la rivereto. Ĝi plaŭdis al ni strangan fabelon kaj hodiaŭ ni bone ridis pri ĝi. Ĉu ne, Abel?

— La fabelo estis stranga, sed mi ne komprenis.

— Kion ĝi fabelis? — demandis Adamo.

— Forgesite! Nur tion mi sentas, ke mi amas mian fraton... tre... tre.

— Kaj vi?!

— Abel kaj mi: ni estas unu.

— Kie estas Heloa? — urĝis Evo.

— Tie, ĉe la montdeklivo ni vidis ŝin pelanta papilion. Ekvidinte min kune kun Abel, ŝi rigardis nin longe, kvazaŭ ŝi neniam estus vidinta nin. Poste ŝi kuris al ni kaj superŝutis nin per pluvego da kisoj... „Nur songo estis, nur songo!“ ripetis ŝi senĉese. Mi ne komprenas, patro!

*

Ĉe la vojkurbiĝo aperis knabino, vigla kiel kapreolineto. Ŝia irado estis facila, kvazaŭ ŝi havus flugiletojn. Laŭte ridante ŝi persekutis papilion antaŭ si.



IMRE PÉRELY: GOLGOTO.

— Patrino!

— Heloa!

— Kiaj strangaĵoj okazas hodiaŭ! Ĉu vi vidas tiun blankharan, longbarban viron, kiu proksimiĝas al ni de la montdeklivo? Mi renkontis lin kaj li diris al mi, ke li estas pli ol 900 jara.

— Pli ol 900 jara?

— Jes! Lia nomo estas Matusalemo kaj li serĉas siajn gefilojn kaj genepojn. Li kisis min. Li estas tiel stranga homo. Li demandis min pri mi kaj aŭdante, ke mi estas filino de Adamo, li ŝajnis dube rideti. Poste li demandis pri la monstro, fluganta super ni. Nekredeme li skuis la kapon, kiam mi diris ĝian nomon. „Ĉu drako?... Songô, verŝajne estas nur songô“ — li murmuris.

— Ĉu li venas al ni?

— Mi ne scias! Li atendas la Mesion. Kiu estas la Mesio?

— Strange!... Mi ne scias, Heloa!

*

— Patro! Rigardu! — ekkriis Abel — Rigardu al la dezerto! Kvazaŭ sonĝo aperus antaŭ niaj okuloj. Ĉu fendiĝis la tero aŭ korpigis la nenio, sed mi vidas multe da tiaj homoj, kiaj ni estas. Sur iliaj korpoj estas io, kio kovras la nudecon. Kio estas tio, patro mia?

— Mi ne scias, Abel!

— Rigardu, rigardu ilin! Ili venas al ni. Ili estas multaj. Unu havas vizaĝon, brilantan de ĉiellumo, kaj liaj manoj, piedoj estas vunditaj. Apud li marŝas longbarba viro, portanta du ŝtontabulojn. La vizaĝo de tiu ankaŭ brilas. Rigardu, tie sekvas ilin la tria. Liaj okuloj estas mallarĝaj, strange oblikvaj. Liaj haroj estas plektitaj kaj pendas ĝis tero. Tie la kvara, kun duonluno sur sia kapornamo... kaj tie ankoraŭ unu. Ho rigardu, patro, tie venas multaj. Iliaj vizaĝoj estas brilantaj. Manon en mano ili venas. Kiuj ili estas?

— Mi ne scias, Abel. Mi vidas nur, ke ankaŭ via vizaĝo estas brilanta, kaj ankaŭ tiu de via patrino. Vi ĉiuj havas lumon ĉielan sur la vizaĝoj kaj mildecon en la okuloj. Mi sentas nur, ke io nekonata lokiĝis en mia koro. Tio faris min malforta, sed plialtigis mian animon. Mi sentas nur, ke mi devas ami tiujn, kiuj venas al ni. Mi devas ami la herbeton, bestojn kaj ĉion, kio estas ĉirkaŭ ni. Io flugis for el mia brusto. Ho, diru, kio estas tio?

*

La grupo jam pliproksimiĝis kaj ili povis bone aŭdi la parolon. La ŝtontabula viro parolis.

— Viaj manoj kaj piedoj estas vunditaj. Ĉu ili doloras?

— Ne, Moseo! Ili estas ja la vundoj de la amo.

— Kiu vi estas, konanta mian nomon?

— Kiun vi profetis al via popolo. La Mesio.

— La Mesio? Filo de Dio?

— Filo de Dio, kiel vi ĉiuj, kiuj venis de tempo al tempo instrui la popolojn por la perfekta boneco.

— Ĉu vi estas martiro? Ĉu la sorto frapis vin senmerite aŭ vi pekis kontraŭ Dio kaj Li punis vin?

— Nek la unua, nek la dua. Dio neniam punis la kreitaĵojn, ĉar Li estas la senfina indulgo. Agon sekvas ago, kion nur la homa malforteco nomis punanta mano de Dio. Mi estas mi mem, ĉar en Kristo per Kristo naskiĝis la krista ideo.

— Kaj vi? Kiu vi estas? Viaj vizaĝo kaj vesto estas fremdaj por mi.

— Mi estas Kong-Fu-Ce kaj jen apud mi Budho.

— Ĉu ankaŭ viaj religioj estas revelacioj?

— Same kiel la viaj.

— La religioj estis neniam revelacioj, nur la kredo, kiu fondis ilin — diris la Mesio.

— Ili devenis el la dependa sento de la homoj. Sen religioj, sen certa scio pri Dio la homo estus vivinta izolite en plena, senĉesa turmento. Benita donaco estis la dependa sento ĉar ĝi ebligis la socian vivon.

Sed kiu religio estis do la sola, ĉielan gracon donanta religio?

— Ĉiu religio estis gracon donanta al tiu, kiu pie, konvinkiĝinte sekvis ĝin. Post ĉeso de la vivo zorgis la senfina indulgemo de Dio pri la animo. Ĉu vi opiniis, ke homo povis fari leĝon por la ĉiela regno?

— Ne!

— La sama kredo vivis en ĉiu homo de la tempokomenco ĝis la fino. Nur la formo, la eksteraĵo konformiĝis al la epoko.

— Majstro! Permesu al mi kisi viajn vundojn. Mi estas Luther.

— Vian nomon mi ne konas, sed vi estas mia homfrato. Kisu min!

— Majstro! Permesu meti la pekeman kapon sub vian plandon! — petegis ruĝbarba viro.

— Ne, Judaso! Per kiso vi perfidis min, per kiso mi povas absolvi vin. Kisu min!

Post la kiso la vizaĝo de la ruĝbarba viro ŝajnis brili. Pro doloroj rompita virino kaj sortofrapita viro venis al la grupo. La Mesio ĉirkaŭprenis ilin.

— Jen la patro kaj la patrino.

La grupo preterpasis kaj Adamo rigardis mirigite ilin.

— Evo! Denove ni sonĝas.

— Ne! Nur ĵus ni komencas vivi.

*

Nova grupo proksimiĝis. Pompe vestitaj faraoj, kirasitaj reĝoj, ordenriĉaj kavaliroj.

— Ho, cezaro, se tiu ĉi manpremo povus forgesigi mian krimon!

Ĝi forgesigas tion, Brutus, ĉar ne la ponardpiko rompis mian koron, sed la maldanko. Sed ĝi estis sonĝo kaj jen la vekiĝo. Kiu vi estas, viro, amare meditanta eĉ nun?

— Heredinto de via trono. Sed ne homo. Vandala besto. Oni nomis min Nero. Mi lasis mortigi patrinon kaj gefratojn. Vaporiĝis la sango de homoj sur sablaĵo de mia cirko.

— Vi havis malbonan sonĝon, filo! Mi estas ja ĉi tie kaj ankaŭ viaj gefratoj. Kisu min kaj vi forgesos vian inkubon.

— Patrino, pardonu vian filon!

— Rememoru! En sangplenaj bataloj ni staris unu kontraŭ alia. Tiam venkis mi, sed nun min turmentas mia triumfo. Ĉu vi povus pardoni min, Konstantin?

— Tiu ĉi manpremo estu la signo por nia paco, Mahomed!

*

La grupo preterpasis. Adamo sentis sin renaskiĝi en cent kaj cent figuroj de la historio.

— Evo! Kial estis la batalo?

— Por kompreni kaj taksi la eternan feliĉon.

*

Paroj proksimiĝis. Amplene, kun delikata rideto ili rigardis unu la alian. Kelkaj el ili gaje kantis, aliaj flustris amajn vortojn. Ĉiu penis diveni la penson de sia kunulo aŭ kunulino.

— Ne estas pli purpuraj la radioj de la aŭroro ol viaj lipoj kaj ne estas rozoj pli ĉarme pompantaj, ol tiuj de viaj vangoj, ho mia Julia.

— Ho, Romeo, teruraj sonĝoj turmentis min dumnokte.

— Forgesu! Vi mem diras ja, ke ili estis nur sonĝoj.

— Ĉu sonĝo estis aŭ turmenta maldormo — mi ne scias.

— Preterlasu ĝin! Rigardu ĉirkaŭen! Miloj da feliĉaj geamantoj ĉirkaŭas nin. Printempaodoro ŝvebas en la aero, kante pepadas la birdoj sur la arboj, ame karesas vin la sunradio kaj la kampo prezentas al vi milkolorajn florojn. Ho venu!

— Antonio! Lipojn viajn mi sentas denove sur la miaj. Via kiso feliĉon ŝtelas en mian koron. Amo via donas al mi novan vivon.

— Ni forgesu la hieraŭon! Amaraj rememoroj forpasu el niaj koroj. Ho, Kleopatra, la vekiĝo estas pli bela ol estis nia maldormo.

*

Evo rigardis ilin. En ŝia koro vekiĝis la sento, ke en ĉiuj virinoj ŝi vidis sin mem.

— Adamo! Por kio estas la virino, se ŝia nomo estas malforteco?

— Por venki per ĝi la fortecon de la viro kaj dolĉigi la amaran postguston de la triumfoj vanaj.

*

Grupo de seriozaj, trankvilaj viroj proksimiĝis. Ili parolis mallaŭte sed kun firma certeco. Unu el ili portis lanternon lumantan, la alia tenis sub la brako amason da libroj, la tria... sed kiu povus finkalkuli ilin?

— La lampon kial vi ne estingas? Estas ja taglumo! Viaj okuloj explore kiun serĉas?

— Malnova kutimo! Vian nomon diru, afabla viro!

— Nur flustre mi diras ĝin, ĉar timas, ke iu povas ekaŭdi, kun kiu mi travivis jam foje la teran vivon. Venu pli proksimen! Mia nomo estas Sokrato!

— Mia modesta nomo estas Diogeno. Diru, ĉu vi ne konas tiujn du virojn, kiuj marŝas antaŭ ni? La unua havas en sia mano solan bastonon kaj la alia faskon da volumoj. Ili ŝajnas enprofundiĝi en amika diskuto.

— Preterpasinte ilin mi aŭskultis la parolon. La bastonhava estas Zaratustro kaj la alia Nietzsche. Ili parolis pri...

— Ho, Sokrato, amata edzo mia! — ŝovis sin virino inter la parolantojn.

— Jen Xantippe! Neniu perdis en la renaskiĝo, nur mi.

— Vi eraras, ĉar mia lango humiliĝis, kiel hundo de ŝafisto...

— Kiu tamen kelkfoje ekbojas.

— Pardonu min!

— En mia koro ne estas kolero.

*

— Adamo kaj Evo ridetante rigardis unu la alian.

*

Ondis homamaso post homamaso en pli aŭ malpli grandaj grupoj. Laboristoj, rompitaĵoj de la vivoŝarĝo; parioj de la iama Hindujo; forlasitaj infanoj; perfiditaj knabinoj kaj malĉastulinoj. En ĉiu grupo regis la senlima pardono, malsupreniĝinta el la ĉiela regno.

Adamo kunvokis siajn gefilojn kaj terenĵetis sin por sendi dankplenan preĝon al la Sinjoro de la universo.

*

Kaj sonis la preĝo kaj ĝi trovis eĥon en koro de ĉiuj kreitaĵoj. La arboj humile klinis la laŭbkronojn, la bestoj ame premis sin unu al alia kaj la homoj, superŝutitaj de la nekonata sento, ekgenuis sur la teron.

Fendiĝis la ĉielo kaj la ĉielaj radioj superbrilis tiujn de la suno. Sonis laŭde aklamanta ĥoro de serafoj, keruboj.

El la fendiĝinta ĉielo sonis ĉion trapertranta voĉo.

— Amo kaj paco regu en viaj koroj! La batalo estas finita kaj alvenis la promesita eterna feliĉo. La spirito de la Malbono, Lucifero, estas ekzilita. La Morto estas venkita, por ke la harmonio de la Amo regu la mondon. Estu vi gracoplenaj kaj kun komprena sento de la koro amu unu la alian!

La milionoj da popoloj komencis vivon en feliĉo, neniam forpasonta. La tempo haltis kaj la miljaroj pasis sen postsigno, pli-ĝuste, ilia paso eĉ ne komenciĝis.

*

En la spaco du longvostaj meteoroj sekvis unu la alian. Sur la unua sidis inerte, senpotence, en obstina muteco la Morto. Sur la alia staris la ĉionneanta spirito de la Malbono: Lucifero.

Kun furioza rapideco la du fajrerantaj globoj kuregis kaj la dua atingis la unuan. La Morto ironie ekkriis.

— Frato! Venkitaj ni estas post la batalo. La promesita eterna vivo fine realiĝis!

— Eĉ kontraŭe! La batalon ni gajnis.

— Mi ne komprenas vin. Kial do ni estas ekzilitaj?

— Ĝuste pro tio, ĉar la homon ni levis al enviinda alteco. La homo estis kreita, kiel la bestoj. Nur tiam fariĝis vere la Homo, kiam mi donis al li el la frukto de la scio. Mi estis la sendependa volo kaj mi estis ankaŭ la ĉion reganta pasio. Kion valoras la homo sen mi. Li estas nur movebla pupo, kiun lia majstro laŭplace puŝetas tien kaj reen. Li ne estas plu sinjoro de siaj propraj agoj kaj li ne estas plu sklavo de la pasioj. Kiu ne estas reganto pri propraj pensoj kaj ne estas sklavo de la pasioj, tiu estas jam mortinta. Ili ambaŭ donas la forton por progresi kreante novan. Penso unuiĝinte kun pasio faris miraklojn kaj donis valoron al la vivo.

— Sur la Tero denove regas vivo. Vivo en plena harmonio de la Amo.

— En harmonio de la eterna stulteco. Rigardu al la Tero kaj ĝuu la plorindan aspekton. Jen: Nero trovas ĉielan feliĉon banante la piedojn en la rivereto, kiel la plej simpla kamparano; Shakespeare, kiun admiris la tuta mondo, kun cerbo malvarmiĝinta nun rigardas la ludon de la sunradioj sur la sablo. Kio estas ĉi tiu vivo? Kiso, unutona komplimento, enuiga jugo de la ĉiela graco? De tempo al tempo oni ĵetas sin teren antaŭ la dia lumo. Jen la imperio de la „perfekta amo“, kie oni ne povas krei, ĉar oni devus antaŭe detrui ion. La amo estas nur tiam belega poemo, se la

muzikon mi komponas al ĝi. Disharmonio kaj ĉiam disharmonio! Jen la sola faktoro al la perfekteco. Nur nun mi vidas ke mi estis sur tiu ĉi kotglobo — la dio.



ATTILA SASSY: ADAMO.

— Kaj kiu estis mi?

— Vi?! Sole ilo!

— Ne! Dio!

— Mi diras, ke nur ilo.

— Ne! Mi naskis la unuan doloron. Tiun doloron, el kiu ĝermis ĉiu belo, per kiu nobliĝis la homo.

— Kiu donis la konscion pri ĝi? Mi kaj sole mi!

— Naskinto de la malfeliĉo kaj angora sento ankaŭ mi estis. Kiamaniere oni povis konsciiĝi pri feliĉo, se mi ne estus ekzistinta?

— Mi mem naskis vin, sklavo! Via ekzisto estis nur malbeno, frukton neniam donanta.

— Ĉu pri benitaj fruktoj fanfaronas vi, kiu estas spirito de la Malbono mem? Via memo, la disharmonio estis fatalo via.

— Neniigu sklavo, atakanta vian sinjoron!

— Neniĝu vi, pro kiu mi estas ekzilita.

La Morto leviĝis kaj per la potenca ostobrado ĝi batis al Lucifero, sed perdinte ekvilibron falis de la meteoro. Ankoraŭ ĝi aŭdis la longesonantan raŭkan ridon de Lucifero kaj poste, kiel eta sensignifa planedo, komencis kuri sur nova orbito ĉirkaŭ iu suno.

*

* *

La sonĝo finiĝis kaj la Morto vekiĝinte ĉirkaŭrigardis kun terura timo.

Silento regis sur la finrikoltitaj kampoj de la Vivo.

Subite ĝi etendis la manon al la falĉilo, kvazaŭ certiĝi pri sia potenca posedaĵo kaj poste, kun ironia rideto, ekiris por nova rikolto — al la Marso.

JULIO BAGHY

EL MIAJ REMEMOROJ

(Daŭrigo)

Tial, en unu letero, kiun mi skribis al S-ro Fruictier, mi aldonis kiel preteriran ekkriion: kiel bone estus, se... k. t. p. — Kaj S-ro Fruictier respondis same: jes ja, kiel bone estus, se... k. t. p.

Dirite, farite.

Kaj tiam nia interkorespondado temadis ĉirkaŭ tiu ideo. Kaj ĝia rezultato estis, ke ni enpresis en la gazeto alvokon al la tutmonda esperantistaro por fondi propran eldonejon-presejon, akcian societon, kies centro estus en Parizo. Kaj la esperantistoj aĉetis akciojn, tiamaniere, ke baldaŭ kunestis la necesa sumo por fondo de la „Presa Esperantista Societo“.

Mia transmigro estis decidita. En septembro 1904 mi rapide disvendis mian presejon, konservante el ĝi nur tiujn ilojn, kiujn mi juĝis utilaj en Parizo, — kaj, kun mia familio kaj kun mia preshelpanto mi forlasis Hungarujon, por fariĝi loĝantoj de Francujo.

Ĉu mi tedu la legantojn per la detala priskribo de mia vojaĝo Parizon? Ne; tion mi ne volas fari. Sufiĉu diri nur, ke dumvoje mi vizitis la maljunan samideanon S-ro E. Meier, en München; tio estis la unua okazo, kiam mi parolis kun esperantisto nekonanta la hungaran lingvon.

Tamen, pri unu epizodo mi raportas. Kiam ni forlasis la lastan germanan urbon, Deutsch-Avricourt, kaj nia vagonaro eniĝis en Francujon, en la unuan francan urbon, Igney-Avricourt, tie mi malagrabla spertis la konsekvencojn de mia nekono de la franca lingvo. Estis posttagmeze, kiam ni alvenis en la ĵus nomitan francan limurbon, kaj tie ni devis atendi pli ol unu horon ĝis la reforiro. Tiun tempon mi intencis profiti por tagmanĝo; mi mendis do nutraĵojn en la stacidoma restoracio — en lingvo germana (tiam mi ne ankoraŭ parolis france). Sed, ho ve! *neniu komprenis min!* oni ne alportis manĝaĵojn... Kun patra doloro mi rigardis miajn malgrandajn infanojn, kiuj jam komencis plendi pri malsato. Mi denove mendis ion por manĝi — denove germane — parolante pri la infanoj, kiuj jam de longa tempo ne vidis konvenajn nutraĵojn, — vane! oni ne komprenis, ne komprenis. Tiam, kun edza doloro, maldolĉe mi turnis min al mia edzino, nerve plendante, en lingvo *hungara*:

— Belaĉa afero, ĝis Parizo ni ne manĝos, je diablo!

Kaj jen, nun sinjorino, el la servopersonaro de la restoracio, ĝentile demandis min *g e r m a n e* :

— Kiun lingvon vi parolas, gesinjoroj?

— La hungaran; ni estas Hungaroj, kaj ni vojaĝas Parizon.

— Do vi ne estas Germanoj?

— Ne, sinjorino, kaj...

— Ho, tiuj ĉarmaj infanoj, kredeble ili estas lacaj kaj malsataj; oni tuj servos al vi, gesinjoroj.

Kaj, ho miraklo! tiam kelnero, servisto, kasisto, ĉiuj, ĉiuj komprenis germane... ĉar ili jam sciis, ke ni ja *ne* estas Germanoj...

En Parizo, S-ro Fruictier atendis nin en la stacidomo kaj li servoprete kondukis nin en nian provizoran, kaj la morgaŭan tagon en nian definitivan loĝejon.

Tuj la unuan tagon de mia estado en Parizo S-ro Fruictier prezentis min al S-ro Th. C a r t . Ne estas necese, — ĉu ne vere, kara leganto? — ke mi pli detale raportu al

vi, kiu estas S-ro Cart; vi ja konas lin, ĉiu konas lin. Lia nomo estos markita per oraj literoj sur ĉiu paĝo de la historio de Esperanto, kaj mi tute ne troas dirante, ke sen li eĉ ne estas certe, ĉu Esperanto vivus hodiaŭ. Por plilarĝigi vian konon pri li, mi aldonos nur, ke mi ne nur respektas, ne nur admiras tiun modelecan viron, sed mi vere amas lin, kaj mi estas fiera, sciante, ke tiu amo estas adresita al plenmerita homo.

Post kelktaga ripozo ni (S-ro Fruictier kaj mi) komencis labori. Ni priparolis detale la fondotan presejon, faris planon, luis ejon (33, rue Lacépède) kaj mendis ĉion necesan. Mi parolis ĉiam esperante (devige!), ĉie, en literfandejo, en maŝinfabriko, en inkaĵfarejo, en papermagazeno, ĉe konstruistoj, ĉe masonistoj, ĉe lignaĵistoj, ĉe vitristoj, ĉe ĉifonistoj, ktp. ktp., propagandante tiamaniere nian lingvon ĉie. Post kelkaj semajnoj la presejo estis funkciopreta, kaj la oktobra numero 1904 estis jam presita en ĝi. (La antaŭan numeron, por ne tro malfruigi ĝin, pro la manko de presejo, oni presis en Céret, sub la gvidado de nia fervora, bedaŭrinde jam mortinta samideano Paul Berthelot.)

Krom la necesaj litertipoj kaj kompostmaterialoj, kune kun la specialaj supersignitaj literoj esperantaj, la presejo konsistis el unu granda presmaŝino, unu malgranda platpresila maŝino, unu „Linotype“ kompostmaŝino, unu motoro kun la bezonaj transmisioj, kaj en la papermagazeno unu granda papertranĉmaŝino. Ses ĉambrojn okupis la Societo, el kiuj unu — la kompostejo — sur la strata fronto; en tiu ĉi ni akceptis la klientojn kaj la samideanojn, el kiuj kelkaj entuziasmoj konsideris nian esperantan entreprenejon kvazaŭ ĝi estus la „oka mirindaĵo de la mondo“.

Post la oficiala deklaro pri la fondo de la „Presa Esperantista Societo“, farita per fondodokumento antaŭ notario, la Societo faris sian unuan ĝeneralan kunvenon, en kiu oni elektis la estraron: prezidanto: S-ro Th. Cart; delegito: S-ro Paul Fruictier; sekretario: S-ro William Mann; teknika direktoro: mi. Poste, oni elektis ankoraŭ unu delegiton: S-ron Ch. Verax, kaj, post la finiĝo de la deĵorado de S-ro Mann, F-ino Cécile Royer fariĝis sekretariino.

(Daŭrigota.)

PAŬLO DE LENGYEL.

ĈU ESTAS LAND'?...

Dediĉata al S-ino A. Sergeant.

D-RO LEONO ZAMENHOF

Ĉu estas land', Kie eternas suno, Kie ĉiel' Ne ploras en aŭtuno? Kie la ter' En
ama sentebrio Per flora brust' Ridas al sunradio?

Ĉu estas land', Kie la ĝoj' ne ĉesas, Senzorga kant' Dorlotas kaj karesas, Kie
kontent' Kaj forta vivadoro, Ne senesper' En ĉies regas koro?

Ĉu estas land', Kie de vivmateno Ne nutrus nin De la mensog' veneno? Kie
preĝej' Glorante amon Dian, Imitus mem Ekzemplon grandan Lian?

Ĉu estas land', Kie la amo tronas, Kie la kor' Perfidi vin ne konas? Kaj kie
larm' Ne estas larm' de ploro Sed de feliĉ' De amoplena koro?

Ĉu estas land', Kie animo laca Trovus en ĝi Ripozon vere pacan? Kaj kie bru' Kaj
krioj de batalo Ne igus nin Memori pri realo?

Ĉu estas land', La lando ideala, Kie la hom' Estas al hom' egala? Kie fratec' Ne
estas vort' de vano, Sed ideal' Plej sankta de regnano?

Ne serĉu ĝin Ĉi landon sur la tero: Ĝi trovas sin En kred' nur kaj espero. En tiu
land' — En land' de propra sento Troviĝas nur Korpaco kaj kontento!

LA KANTISTO DE L' MIZERO

JACINTO BENAVENTE

Lia aspekto: fripona, senhonta, strata kantisto. Li estis la sorĉa poeto de l'
popolamaso, de tiu mizera amaso, kiu suferas ĉiajn dolorojn, sen propra sento pri la
sufero.

De la tagiĝo li vagadis en la urbo, trairis la ĉefajn stratojn, kie nobeloj, potenculoj kaj
komercistoj marŝadis en ofenda bruo, kaj li eĉ unu fojon ne haltis tie por kanti; sed
dum lia malrapida irado li melankolie meditis pri la streĉita, vigla urbovivo, kaj lia
animo ensuĉis indignon kaj malĝojon.

En flankaj stratoj, en mallumaj amasloĝejoj, haladzaj spiradejoj por la mizeraj
loĝantoj, kantis la poeto ĉirkaŭata de homoj malriĉaj, sensciaj, ĉifonaj, malsataj;
kelkfoje li kantis kun la sankta malamo de l' poeto, alifoje kun malgajo, senkonsolo:
homa Kristo al kiu mankis dieco de Savanto; ofte liaj strofoj estis senenhavaj, sed
brilaj pro harmonio: amaj litanioj, kiuj penetris en la animon kun aromoj de ĉiuj amoj,
kaj subita interna tagiĝo heligis la mienojn kiuj antaŭe esprimis malgajan nescion, kaj
ĉiuj proksimiĝis ĉirkaŭ lin por aŭskulti kaj posedi liajn vortojn; sanktoleitaĵ per dia
poezio, al ili restis sur la fruntoj por ĉiam gravuritaĵ ĉielaj vortoj... justeco, pieco,
espero!

Neniam kantis aliajn amojn la poeto: Kantisto de l' Mizero, kiel ĉiuj lin nomis.
Mizero estis lia amatino, kaj li neniam havis pli fidelan amon.

Sed la filino de l' Reĝo estis tre inklina al poezio; cent kortegaj poetoj flatis ĉiam ŝian vantemon de belulino kaj princino, ŝi tamen deziris aŭskulti la popolan poeton de libera spirito, kiu atakis la kortegajn morojn per sia satiro, kiu minacis la potenculojn per detruo kaj morto, kiu ne submetiĝis al beleco, nek al forto, nek al riĉeco; ŝi deziris aŭskulti la Kantiston de l' Mizero.

Kaj ŝi fine aŭdis lin kaj ploris lin aŭdante, kaj ŝi aspektis tre bela dum ŝi malĝoje ploris pri doloroj neniam de ŝi sentitaj, ĝis la poeto Kantisto de l' Mizero, unuafoje, ekkantis pri beleco de virino. La princino certigis, ke neniuj alia poeto kortuŝis ŝin tiel dolĉe; kaj la poeto certigis, ke neniuj alia komprenis lin tiel, kiel la princino.

— Ne bone mi faris, ke mi aŭskultis tiom da kortegaj poetoj! Kion ili povis diri al mi krom flataj mensogoj? De nun vi estos mia preferata poeto.

— Ne bone mi faris, ke mi kantis miajn kantojn antaŭ mizeruloj. Ĉu ne pli bone decas kortuŝi pie la potenculojn ol vekoj per minacoj la humilulojn? De nun mi kantas nur por vi.

Kaj tiel la poeto restis por servi al la filino de l' Reĝo. Kun koloraj brodaĵoj ĉe brusto, sur koro, oni vidis lin rajdanta je la servo de l' reĝa ĉaro; la mizeruloj perdis por ĉiam sian poeton, kaj de tiam se nova trubaduro diris al ili: „Aŭskultu min, mi estas nova Kantisto de l' Mizero“, ili preteriris malkonfide, malgaje, senkrede kaj diris:

— Certe! Kantisto de l' Mizero, ĝis kiam princinoj ekdeziros aŭskulti vin.

El la hispana: FELIKSO DIEZ

[[Aŭskultu](#)] [[Vidu PDF-on](#)] [[MusicXML](#)]

NOVA SENTO

(HIMNO DE E. R. A.)

POEMA DE JULIO RAGHY

MÚSICA DE TEBODORO FALLÓN

Introducción

Mano

f *piano*

Muslo

No-va sen-tila sa-lu-tas-te m'i
No-va sen-tila ma-gi-a fonde de l'pa

Ha-ne Re-ga en ni-a ja-la to-d' No-va sen-tila ra-
Ker-dor Je ni Sa-pi-ra la pa-lar No-va sen-tila Ka-

di-je ni ja-la sa-ne Pre-la tem-pe-ra por la mond' Har-
ru-je de l'ci-a or-do- ga-da la pa-con de l'pa-mor' Car

Tempo di Marcia

di-te ni han go-jo ra-pi-do sen san-cel' Car
pa-con pre-ue a-mer ho-me con gar-das el' Ni



NOVA SENTO

(HIMNO DE E. R. A.)

Poemo de Julio Baghy — Muziko de Teodoro Pallós

Nova sento, salutas kore vin ni kune
Regu en nia frata rond'. Nova sento, radioj
viaj brilu sune
Portu komprenon por la mond'.

Hardite ni kun ĝojo
Rapidu sen ŝancel'. Ĉar gvidas ĝi sur vojo
Tra l' nigra nokt'
al cel'.

Profetas klare por ni
Mistera kora son': Por teran pacon formi
Vi homo restu
hom'.

Nova sento, magia forto de l' konkordo
Je vi sopiras la fratar'. Nova sento,
kerubo de l' socia ordo
Gardu la pacon de l' homar'.

Ĉar pacon kreus amo,
Homecon gardas ĝi Ni ĵuras ke ĉi flamon
Ne ĵetos for de
ni.

Ni semos se modeste, Sed sen ripoz' sen lac', Ke fine venku feste: Tutmonda homa pac'.

LA OVO

ALBERT KIVIKAS

Trans la marĉon kondukis piedsigna vojeto, dronanta en marĉeto, leviĝanta sur altaĵeton, trairanta arbitaĵojn kaj ebenajon, serpentumanta kvazaŭ stria kolubro ĉirkaŭ dika arbo, finkondukanta tamen al sablejo, al mizera kabano.

Laŭ tiu piedsigna vojeto hejmenpaŝis laboristo, havante lacecon kvazaŭ ŝarĝon de sablo en karno kaj sango, kaj en la stomako kvazaŭ malsatajn hundojn kolere bojantajn. Pro malforteco liaj piedoj fleksiĝis kaj devigis lin sidiĝi sur altaĵeto por ripozo.

Sidas la viro, laciĝinta, luktanta kun la dormo; preskaŭ perforte la okuloj fermiĝas.

Dormas la viro kaj subite ekaŭdas, kiel iu plaŭdante venas laŭ la akvoplana vojeto kaj murmuras.

— Verŝajne hundo, — pensas la viro, kaj ne malfermas la okulojn — ĝi vagadu!

Sed la murmurado kaj plaŭdado jam estas tute proksimaj.

Nun la viro volas malfermi la okulojn, sed la palpebroj estas strange pezaj; li provas per la dika fingro suprenŝiri ilin, per la manplato li viŝas la vizaĝon — nenio helpas, li ne povas malfermi la okulojn.

Sed la murmurado proksimiĝas pli kaj pli.

Subite rimarkas la viro, ke li vidas ne malferminte la palpebrojn, tute klare li vidas per siaj okuloj tra la fermitaj palpebroj.

Jen: granda lupro venas laŭ la vojo, la vosto treniĝas en nura akvo, la kolsupro suprenstaras kvazaŭ la haregoj de virporko, sed la okuloj estas fermitaj — kaj ĝi murmuras. Rigardas kaj rigardas la viro tra la fermitaj palpebroj kaj miras:



RÉVÉSZ: PETŐFI EN LA DRINKEJO.

— La okuloj de la lupo estas fermitaj, sed ĝi sen deflankiĝo rekte iras la vojeton!
Miraklo de mirakloj, ĝi iras sen deflankiĝo la vojeton kaj murmuris!

Sed la lupo, plaŭdante, pli kaj pli alproksimiĝas.

Ho! Ĝi kvazaŭ havas ion en la buŝo?

Rigardas kaj rigardas la viro, kaj vidas: la lupo havas kokinan ovon en la buŝo.
Rigardas la viro ankoraŭ pli fikse: jes, la lupo efektive havas kokinan ovon en la buŝo!

Pensas la viro, kion do faru la lupo kun la kokina ovo: neniam dum sia vivo li aŭdis,
ke la lupo manĝas ovojn.

Ŝtelrigardas kaj ŝtelrigardas la viro la ovon en la buŝego de la lupo, kaj subite eksentas
kolektiĝi la salivon en la buŝo pro apetito — li estas tre malsata, kaj eble la ovo estas
kuirita kaj manĝebla.

Sed la lupo, ne malfermante la okulojn, pli kaj pli proksimiĝas laŭ la vojeto, inter la
dentegoj ĝi portas la ovon, la tutan tempon murmurante.

Ĝi jam preskaŭ estas atinginta la viron, kiam ĉi tiu subite ekkrias: — He!

La lupo pro timo ekbojas, faligas la ovon el la buŝo, malfermas la okulojn, ekvidas la
viron kaj forkuras arbaron. Sed la ovo restas ruliĝanta sur la vojeto.

— Ovo, — pensis la viro — ovo kiel ovo!

Sed mirinde granda estas ĉi tiu ovo, pli granda ol tiu de anaso aŭ de ansero.

La ovo eble estas kuirita — pensas la viro denove, kaj ekprenas ĝin en la manon.

Sed la ovo estas varma, kvazaŭ ĵus prenita el la kaldrono. Palpas la viro ĝin de ĉiu flanko — sed subite — la ovo ekmurmuras!

Li rompis per tranĉilo ĝian ŝelon, la murmuro ĉesis. La ovo estis efektive kuirita, eĉ la ovoflavo estis malmola.

Manĝas la viro longan tempon avide la ovon, li manĝas, sed formanĝi ĝin ne povas. Li estas jam tute sata, sed duono de la ovo estas ankoraŭ ne formanĝita.

— Restos eĉ por mateno — pensas la viro, kaj metas la duonovon en sian sakon.

Post tio li, sur la altaĵeto, ekdormas profunde.

Matene vekiĝinte li vidas:

Nenie plu estas la duonovo, en la sako troviĝas la vosto kaj la malantaŭaj femuroj de lupido.

El la estona: HILDA DRESEN.



JACINTO BENAVENTE

MONDLITERATURA OBSERVO

JACINTO BENAVENTE. Denove la ĉarma Hispanlando ricevis nordan kareson. La Nobel-premio venas jam la trian fojon en la landon de l' oranĝarbaroj. Ĝin jam gajnis Echegeray (matematikisto kaj dramverkisto), Ramón y Cajal (histologo), kaj nun la dramverkisto Jacinto Benavente.

Benavente aperas antaŭ la eksterlandanoj kiel nekonita, ĵus trovita homo. En lia patrolando jam delonge estas solena okazaĵo kaj brila sukceso ĉiu nova dramo de Benavente, sed en fremdajn lingvojn oni apenaŭ tradukis dekon el la riĉega verkaro de la rekonstruinto de l' hispana teatra arto kaj pro la neeviteblaj perdoj en traduko la profunda kaj delikata artisto... ne ĉiam plaĉis tiel kiel li meritas. Germana traduko, kiun mi legis tute ne plenumis miajn esperojn.

(Estas interese ke al la Esperanta publiko Benavente estis jam antaŭlonge prezentita. En „La Revuo“ aperis de li, en la traduko de Vicente Inglada „La Angora Katino“, „La Gefavoratoj“, „Kruela Adiaŭo“. La „Hispanaj Dramaj“ en la Internacia Biblioteko de Borel konsistas nur el verkoj de Benavente.)

Benavente estas vere delikata artisto, kiu trovas altajn ideojn kaj subtilajn sentojn kaj vestas ilin per susuranta silko de sia poezia prozo. Ni ne scias kion pli multe admiri, ĉu la belecon de lia lingvo, ĉu la trafan, ĉiam altrangan (kvankam kelkfoje iom sofisman) spiritessprimon, ĉu lian majstrecon en karakterizo kiu per kelkaj vortoj kaj trajtaj povas al ni plene prezenti homojn pli perfekte ol per longedaŭra priskribado. Majstra konanto de la eleganta mondo kun ĝiaj artifikaj intrigoj, spritaj malicaĵoj, flataj hipokritoj, li vivigas antaŭ ni ĉi tiun mondon tiel brilegan ekstere. Kaj la virinan animon, jen flirtteman, kaprican, bagateleman, jen varman, sindonan, sinoferan li konas mirinde. Tion li pruvas jam en unu el siaj unuaj verkoj, en la „Virinaj Leteroj“, kiu estas ĉarme kaj facile verkita, sed profunda virinpsikologio.

Inter la kadroj de mallonga artikolo apenaŭ oni povas konigi lian abundan verkaron, nur skize ni volas paroli pri kelkaj karakterizaj trajtoj de lia verkadmaniero.

Ĝi montras bone videblan evoluon de la facile amuza Muzo al la profundpensa, altnivela, kvazaŭ filozofia arto. La unuaj komedioj: Konataj Personoj, Edzo de Sinjorino Tellez ktp. estas graciaj satiraj komedioj kun temo pri amo en diversflanka variado. Ilia sprita kaj kolora lingvaĵo, interesaj, amuzaj konfliktoj tuj altiris la atenton de la publiko, baldaŭ li fariĝis famekonata. Sed la sukceso ne delogis lin, lia genio savis lin de tio, ke li fariĝu simpla amuzisto de la publiko. Lia poezio ĉiam pliprofundiĝas en la misterojn de la homa animo, en la sekretojn de la socia vivo. La „Manĝaĵo de Sovagbestoj“, „La Fajra Drako“, „Sabata Vesperto“, „Triumfanta Amo“ surprizas, frapas kaj konsternas per sia realeco, per la kuraĝa eldiro de kruelaj veroj. Lian poetan koron montras la „Princino sen Koro“, lian romantikan fantazion la „Kuzo Roman“ kaj „La Bruta Forto“. Lia kono pri virinanimio en majstraj koloroj

pompe ekbrilas en „La Angora Katino“. Kiel grandan stiliston montras lin precipe la „Kreitaj Interesoĵ“. Rava antaŭparolo anoncas la farson: la ludon de pupoj. Kaj sur la kruda tolaĵo li brodas per oraj kaj silkaj fadenoj, la pupoj parolas sorĉebrilan, dolĉan lingvon, eldiras elegantajn, akrajn sentencojn kaj sub la krakantaj lignomembroj pulsas vivanta sango, homaj sortoj, deziroj, voloĵ luktas kaj penas, homaj eraroj pentas, homaj intrigoj artifikas. Kaj super ĉio regas la potenco de la Amo. Tiel vera bildo aperas al ni en ĉi tiu pupludo pri la nuntempa homa socio ke oni suspektis certajn kaŝ-atakitajn personojn sub ĉi tiuj pupigitaj tipoj. Ĉi tiu verko faros sian gloran vojon tra la mondliteratura historio. Leandro restos ĉiam la sinjoro de altaj revoj kaj lia fidela Crispin, en la servo de sia sinjoro, venkos ĉian malfacilaĵon per sia profunda homkono.

Ni ne forgesu pri la altmorala „Lernejo de Princinoj“ kaj pri la „Princo, kiu ĉion lernis en la libroj“, pri ĉi tiu nobla fantazia verko.

Nun Benavente forestas el sia hejmo. En Ameriko li ricevis la kison de diino Rekompenco. Kion li alportos el la nova mondo?

Kiam Goethe revenis Germanujon, li verkis sian Ifigenio en Taŭrido, ĉi tiun korpigitan revon de nordulo pri la lando de la Antikvo, pri la sopirata Sudo.

Per kio vibrigos nian koron Benavente reveninte el la lando de l' „senlimaj eblaĵoj“?

F. DIEZ

BIBLIOGRAFIO

STRANGA HEREDAĴO. Romano originale de H. A. Luyken. 320 pĝ. broŝur. Eldonejo Ferd. Hirt & Sohn. Esperanto-fako. Leipzig.

La tria originala romano de la aŭtoro. Vera Luyken-a romano, plena de tendencoj, en kiuj la okazintaĵoj preskaŭ perdas sin. Troimagitaj heroo kaj heroino, kies ideala mondpercepto tre malfacile povas sin lokigi en la tera mondo. La aŭtoro, kaj tion sentas la leganto, vere luktas kontraŭ la realeco, kiu prezentus sin ĉiam tute male ol estus deca al pensmaniero de la verkisto, sed tamen lia rutina lerteco venkas la barojn kaj li sukcese finkonstruas sian verkon. Malfacila kaj ne danko tasko estas montri al la egoista mondo, ke la mondo de altruismo estas pli bela, pli homa ol la senĉesa pelado kaj blinda kuro al efemeraj plezuroj. Kvankam ne perfekte, sed sufiĉe klare prezentas la verko la erarojn de la nuntempo kaj montras ĝustan vojon al pli bela estonteco.

Specialan atenton meritas en la romano la epizoda figuro de religia sektestro, en kiu la aŭtoro donas veran homon kun virtoj kaj eraroj kaj ĝuste pro tio la sceno en la mistera

domo estas majstre verkita. La vivo pulsas ankoraŭ en tiu parto, en kiu la aŭtoro nin kondukas en Meksiklandon kaj en la tragedia parto, kiam la juna heroino konsciiĝas pri sia morala malaltiĝo.

La verko estas tre valora el vidpunkto de nia originala literaturo, ĉar ĝiaj enhavo, konversacioj klare montras la erarojn de la Esperantista popolo, kiu ankoraŭ ĉiam nur revadas anstataŭ la energia agado.

Ni varme rekomendas al ĉiu la romanon ĉar ĝia stilo estas bona kaj flua, ĝia enhavo multloke tre valora kaj la eksteraĵo tre plaĉa.

Ni mencias, ke nia ŝatata verkisto baldaŭ surprizos nin per la kvara originala romano, kiun ni atendas kun sincera interesiĝo. Ĝia titolo estas: „En tempo de la Gol“.

(by)

VORTARO DE LA OFICIALAJ RADIKOJ DE ESPERANTO, — de Th. Cart. — 32 paĝoj. Esperantista Centra Librejo, Paris (IX.), 51, rue de Clichy. Prezo: 1 franko (franca).

Tiu ŝajne sensignifa, modesta broŝuro, verkita de la talenta prezidanto de la esperantista Akademio kaj Lingva Komitato, enhavas, post klariga noto, oficialajn, dokumentojn, t.e.: eltiraĵon el la „Deklaracio pri Esperantismo“, — konsilojn pri enkonduko de novaj vortoj en la komunan lingvon. — la plenan gramatikon de Esperanto, — poste la tutan Oficialan Radikaron de Esperanto (sen nacilingvaj tradukoj), — fine la ĉefajn landnomojn kaj aliajn geografiajn nomojn. Sur la kovrilo, krom anoncoj, ĝi publikigas la adresojn de la akademianoj.

Tre utila estas tiu verko, precipe nun, kiam multaj esperantistoj estas tentataj fari novajn vortojn kaj sufiksojn, enkondukante tiamaniere senutilajn kaj embarasajn neologismojn kaj naciismojn en Esperanton. Ne nur ĉiu verkisto, gazetisto kaj presisto, sed ĉiu serioza esperantisto devus posedi jenan verkon, kiu estas efike konsultebla en okazo de hezito, por konservi la lingvan unuecon de Esperanto.

La samideanoj povas nur gratuli kaj danki la fervoran S-ron Cart, kiu nelacigeble laboris por doni en la manojn de la esperantistoj tiun bonegan ilon, rezultaton de laboro de nia Akademio.

(p d l.)

FIDELECO KAJ ESPER'. — **HIMNO PRI UNIVERSALA PACO.** Poemoj de S. Frantz, muziko de F. de Menil kaj Vincent F. Bort.

Ĉarmaj melodioj. Vere rekomendindaj por kantado dum Esperantaj festoj.

BABILADOJ DE BONHUMORA ZAMENHOFANO, de Ŝapiro (Joŝo).

Trafaj satiroj pri interna vivo de la Esperantistaj societoj. Vergas kaj samtempe instruas nin pri la evitindaĵoj.

AKORDOJ ESPERANTAJ, de M. L. Kaplan.

Poemoj, kiuj montras evoluantan talenton. Ne nur lirika, sed ankaŭ epika poezio trovas kelkfoje valorajn interpretaĵojn en tiu ĉi verketo.

VOGTLANDO. Gvidlibro okaze de la Dekvina 1923 en Nürnberg.

Bele ilustrite aperas antaŭ la okuloj la belegaj pejzaĝoj de la vidindaĵriĉa Vogtlando.

DISPUTO

PRI LA DISPUTO. — Kiam ni ekirigis ĉi tiun rubrikon en nia revuo, ni sentis nin iom kulpaj, kiel Pandora post la malfermo de sia tenujo. Ni sciis, ke en Esperantujo, sub la serena marsupraĵo de la konkordo embuskas profundaj ondomovoj, tute ne pacemaj, kaj ni pensis, ke ili nun ĉiuj tumultos al tiu ĉi rubriko kaj minacos nin per superakvego de viglaj spiritaĵoj, parolskermoj, parolluktoj, parolbataloj.

Kaj ni eĉ estis tiel malicaj, ke ni deziris tion. Ni deziris havi en ĉi tiu rubriko ne sekajn diskutojn laŭ akademia maniero, sed ŝaŭmante bonhumorajn, viglajn, batalemajn ataketojn kontraŭ *ideoj* (neniam kontraŭ personoj), ataketojn, kiuj petole mallaŭdas, kun malica rideto grumbblas kaj kiuj por argumento prefere uzas la vekon de rido. Disputi ni volas, karaj samideanoj, kelkfoje eble eĉ friponete, kvazaŭ ŝuistbubeto eliganta sian langon, kaj solan timon ni havas, ni ne volas esti enuaj.

La rubriko atendas sian majstron. Ĝis nun vane. Nun ĝi silentas, ne volas embarasi la feston de Kristnasko. Sed poste, hu — mi frostotremas pri la terura lukto kiu komenciĝos ĉi tie. Venu, disputemuloj! Disputu, grumblu, mallaŭdu. Redisputu, regrumblu, remallaŭdu! Kontraŭredisputu... ktp. Sed estu viglaj, spritaj, amindaj ankaŭ en la malico, ataku, sed amuzu. Kaj kiu koleros, tiu jam apriorie ne estos prava.

DISPUTESTRO.

SENTITOLE...

Aglo flugas alte en l' aero, Struto marŝas pene sur la tero. Laflugilojn struto
vane movas, Ĝi atingi aglon, ho, ne povas...

(by)

RICEVITAJ GAZETOJ.

L'Esperanto, Belga Esperantisto, The British Esperantist, La Policisto, Esperanto
Praktiko, Hungara Esperantisto, Franca Esperantisto, Interligilo de la P. T. T.

*

Ni ĉi tie atentigas la legantojn pri la aldonita folieto pri la Kataluna Internaciaj Floraj
Ludoj kaj pri la konkurso de la Literatura Mondo, kies kondiĉoj estas troveblaj en nia
dua numero.

La grafikajn ornamaĵojn de nia revuo desegnis
MIĤAELO KUN
la talenta grafikartisto.



La evoluon de la
grafikaj industrioj
servas la interesa



MAGYAR GRAFIKA

(HUNGARA GRAFIKO)
BUDAPEST VI, ARADI-UTCA 8

Ĉiuj, kiujn interesas la grafiko de l' arto, mendu
ĝin! Unu numero kostas hungaran K 250.—

MODERNAJ ROBINZONOJ!

? ? ? ? ? ? ? ? ? ? ? ? ? ?

INTERNACIA FOIRO EN PRAHA (Ĉeĥoslovakujo)

Informojn donas: PRAŽSKÉ VZORKOVÉ
VELETRHY Staroměstská radnice PRAHA

Esperanto korespondata!



PAN YAN

EN LA TUTA MONDO LA PLEJ BONAJ
VINAGRA KONSERVAĴO
KAJ SAŬCO

Pro sia unika,
tre agrabla gusto
ili jam atingis lokon ĉe
la publiko pli altan
ol ĉiu alia.

★

La diferenco
kuŝas ĝuste en tio, ke ili
atingis la plej altan gradon
de bonegeco.

*Vendataj ĉie en boteloj de du grandoj
je modera prezo*

Solaj posedantoj:

MACONCHIE BROSS., LTD
LONDON, E. 14

Könyves Kálmán

r.-t.

• ((Fama eldonejo de reproduktajoj por artaj bildoj!
Desegnaĵoj, pentraĵoj de mondfamaj artistoj! Rekomendas siajn eldonaĵojn Petu ilustritan prezaron!)) •

Budapest VI, Nagymező-utca 37-39

ESPERANTO SERVICE CORPORATION „ESKO“

500 FIFTH AVENUE NEW-YORK CITY

Telegrafa adreso: ESPERANTO NEW-YORK

Aĉeto, elsperto, importo kaj maklerado de ĉiuspecaj komercaĵoj

Katalogoj, prezaroj kaj specimenoj estos danke ricevataj

O R I E N T O !

Havigu al vi tuj la interesplenajn literatur-historiajn verkojn, kun tri-koloraj etnografiaj kartoĵoj, en plej konciza Esperanto, laŭditaj de ĉiuj:



**LA BULGARA LANDO KAJ POPOLO
LA NAJBAROJ DE RUSLANDO**



Kontraŭ 1 dol., 5 sv. fr., 10 fr. fr.,
25 ĉ. kr., 500 g. mk. (laŭ la monvaluto de l' mendinto) sendas rekomendite la aŭtoro:

I V A N P. K R E S T A N O F F

Dresden—A., Wintergartenstrasse 9. Germanuj.

Ĉiu konscia esperantisto devas
esti membro de la oficiala
mondorganizacio

U. E. A.

Aliĝu tuj ĉe la delegito de via
loko aŭ ĉe la Centra Oficejo de

UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO :

12, BOULEVARD DU THÉÂTRE
GENÈVE, SVISLANDO!

ATENTU! BABILADOJ ATENTU!

**DE BONHUMORA
ZAMENHOFANO**

DE JOŜO

kaj

AKORDOJ ESPERANTAJ

DE M. L. KAPLAN

estas riceveblaj ambaŭ kune por 6 nove stamp-
itaĵ respondkuponoj ĉe

J. ŜAPIRO

LEPOVA 33, BIALYSTOK (POLUJO)

Seriozaj,
humoraj
rakontoj



**FOR LA PREZO
DE TIU ĈI NUMERO**

aŭ por du 60 centimaj
respondkuponoj:

KVIN LEGINDAJ LIBRETOJ



teatraĵeto,
poemoj,
noveloj.

Mendu tuj ĉe

PAŬLO HALKÁNYI

*Budapest, VI., Haj's-utca 15.
Hungarujo.*

**B U L G A R A
R O Z O L E O**

La fama bonodoraĵo por
parfumaĵoj, sapoj, k. t. p.
unuakvalita, pogrande kaj pomalgrande

Specimena botelo kontraŭ

10 sv. fr. aŭ 25 fr. fr.

*IVAN KRESTANOFF, Eksporthicejo
Wintergartenstrasse 9, Dresden-A., Germanujo.*



**FAKULOJ ABONU
LA OFICIALAN
GAZETON**

LA POLICISTO
KUN LA KONSTANTA ALDONO
LA POŝTISTO

REDAKCIO:

BUDAPEST,

IX, ŰLLŐI-ŰT 59.



Reklamaj Tekstoj

Prezo de unu numero: 1 svisa franko aŭ egalvaloro.

Abonprezo por unu jaro:

- 2.— dolaroj
- 5.— guldenoj
- 7.— sved. kronoj

- 10.— svis. frankoj
- 10.— danaj kronoj
- 25.— fr. frankoj
- 10.— norv. kronoj
- 12.— pesetoj
- 10.— ŝilingoj
- 40.— liroj
- 60.— ĉ. kronoj
- 5.— jenoj

Abonon bonvolu sendi laŭeble en registrita letero *al nia adreso*, aŭ en la sekvantaj landoj, al niaj abonejoj:

- *Aŭstrujo*: Wien, Esperanto-eldonejo „Nova Tempo“, VI., Mollardgasse 55.
- *Britujo*: The British Esperanto Association, 17 Hartstreet, London, WC. 1.
- *Bulgarujo*: Centra Librejo Esperanto (Gaŝevsky) Sofia.
- *Belgujo*: Franz Schoofs, 45 Kleine Beerstraat. Antwerpen, Poŝtĉekkonto No 284. 20. — E. Haine, 23, rue du Marais, Rysbroek, Bruxelles.
- *Ĉeĥoslovaka*: Otto Sklenčka, Hradec Králové.
- *Danujo*: Martin Blicher, International Boghandel, Hotel d'Angleterre, Kobenhavn.
- *Estujo*: Helmi Dresden, postkast 6, Tallin.
- *Francujo*: Raymond Schwartz, 4, rue d'Hauteville, Paris.
- *Finnlando*: O/Y. Movado A/B. Helsinki, Kasarminkatu 20.
- *Hispanujo*: Konrado Domenech, Hotelo Flora Banyoles, Ĝirona. — Ferdinando Montserrat, Barcelona, Str. Villaroel 107, 20 20.
- *Italujo*: Johano Maindari. Viale Vittoria 1, Milano 21.
- *Jugoslavujo*: D. D. Maruzzi, Zagreb, Jezuitska-ul. 1.
- *Polujo*: Adolfo Oberrotman, Krak. Przedm. 10 Warszawa (P. K. O. n-o 3125).
- *Rumanujo*: Esperanto Oficejo, Cluj.

LAŬVOLE SENDU ALTAN SUMON KAJ NI LIVEROS TIOM DA NUMEROJ, KIOM VALORAS LA PAGO!

Vi povas ankaŭ pagi per ia ajn banko al sekvantaj naciaj bankoj, por la konto de Hungara Ĝenerala Kreditbanko (Banque Générale de Crédit Hongrois Ungarische Allgemeine Creditbank), B u d a p e s t , por „Literatura Mondo“:

NACIAJ BANKOJ:

- *Amsterdam*: Amsterdamsche Bank
- *Bratislava*: Slovenská Všeobecná Úverná Banka
- *Berlin*: Direction der Disconto Gesellschaft
- *Bruxelles*: Banque de Bruxelles
- *Christiania*: Den norske Creditbank
- *Copenhagen*: Kobenhaven's Handelsbank
- *Milano*: Banca Commerciale Italiana
- *London*: The National Provincial & Union Bank of England Ltd.
- *New-York*: Guaranty Trust Comp of New-York
- *Paris*: Banque de l'Union Parisienne
- *Sofia*: Banque Balkanique
- *Stockholm*: Skandinaviska Kreditaktiebolaget
- *Zürich*: Schweizerische Bankgesellschaft

ANONCOJ:

GRANDAJ LAŬ INTERKONSENTO!

MALGRANDAJ:

PO DU EMPRESOJ LA PREZO DE UNU NUMERO!

PAGO NEPRE ANTAŬE!

Nia sola semajna gazeto estas la

ESPERANTO TRIUMFONTA

Internacia! Semajna! Neŭtrala!

Nepre abonu ĝin!

Abonejoj en ĉiuj landoj

Administracio:

Horrem bei Köln, Germ.

La evoluon de la grafikaj industrioj servas la interesa

MAGYAR GRAFIKA

(HUNGARA GRAFIKO)

BUDAPEST VI, ARADI-UTCA 8

Ĉiuj, kiujn interesas la grafiko de l' arto, mendu ĝin! Unu numero kostas hungara K 250.—

MODERNAJ ROBINZONOJ!

??????????

INTERNACIA FOIRO EN PRAHA

(Ĉeĥoslovakio)

Informojn donas: PRAŽSKÉ VZORKOVÉ VELETRHY Staroměstská radnice
PRAHA

Esperanto korespondata!

PAN YAN

EN LA TUTA MONDO LA PLEJ BONAJ

VINAGRA KONSERVAĴO KAJ SAŬCO

Pro sia unika, tre agrabla gusto ili kam atingis lokon ĉe la publiko pli altan ol ĉiu alia.

La diferenco kuŝas ĝuste en tio, ke ili atingis la plej altan gradon de bonegeco.

Vendataj ĉie en boteloj de du grandoj je modera prezo

Solaj posedantoj:

MACONCHIE BROSS., LTD
LONDON, E. 14

Könyves Kálmán

r.-t.

Fama eldonejo de reproduktaĵoj por artaj bildoj!

Desegnaĵoj, pentraĵoj de mondfamaj artistoj! Rekomendas siajn eldonaĵojn

Petu ilustritan prezaron!

Budapest VI, Nagymező-utca 37-39

ESPERANTO SERVICE CORPORATION „ESKO“

500 FIFTH AVENUE NEW-YORK CITY

Telegrafa adreso: ESPERANTO NEW-YORK

Aĉeto, eksporto, importo kaj maklerado de ĉiuspecaj komercaĵoj

Katalogoj, prezaroj kaj specimenoj estos danke ricevataj

ORIENTO!

Havigu al vi tuj la interesplenajn literatur-historiajn verkojn, kun tri-koloraj etnografiaj kartoĵoj, en plej konciza Esperanto, laŭditaj de ĉiuj:

LA BULGARA LANDO KAJ POPOLO
LA NAJBAROJ DE RUSLANDO

Kontraŭ 1 dol., 5 sv. fr., 10 fr. fr., 25 ĉ. kr., 500 g. mk. (laŭ la monvaluto de l' mendinto) sendas rekomendite la aŭtoro:

IVAN H. KRESTANOFF

Dresden-A., Wintergartenstrasse 9. Germanujo.

Ĉiu konscia esperantisto devas esti membro de la oficiala mondorganizo

U. E. A.

Aliĝu tuj ĉe la delegito de via loko aŭ ĉe la Centra Oficejo de

UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO:
12 BOULEVAND DU TÉÂTRE,
GENÈVE, SVISLANDO!

ATENTU! BABILADOJ DE BONHUMORA ZAMENHOFANO DE JOŜO kaj
AKORDOJ ESPERANTAJ DE M. L. KAPLAN estas riceveblaj ambaŭ kune por
6 nove stampitaj respondkuponoj ĉe J. ŜAPIRO LIPOVA 33, BIALYSTOK
(POLUJO)

Seriozaj, humoraj rakontoj, teatraĵeto, poemoj, noveloj.

POR LA PREZO DE TIU ĈI NUMBERO

aŭ por du 60 centimaj respondkuponoj:

KVIN LEGINDAJ LIBRETOJ

Mendu tuj ĉe PAŬLO BALKÁNYI
Budapest, VI., Hajós-utca 15. Hungarujo.

Bulgara ROZOLEO

La fama bonodoraĵo por parfumaĵoj, sapoj, k.t.p. unuakvalita, pogrande kaj
pomalgrande

Specimena botelo kontraŭ 10 sv. fr. aŭ 25 fr. fr.

IVAN KRESTANOFF, Eksportoficejo
Wintergartenstrasse 9, Dresden-A., Germanujo.

FAKULOJ ABONU LA OFICIALAN GAZETON

LA POLICISTO
KUN LA KONSTANTA ALDONO
LA POŜTISTO

REDAKCIO:
BUDAPEST, IX, ÜLLŐI-UT 59.

ARTPLENAJN FOTOGRAFAĴOJN
FARAS
DISKAY

BUDAPEST
VII., RÁKÓCZY-UT 72

KIU NE POVAS ABONI „LITERATURA MONDO“-N EĈ POR DUONJARO
MENDU ĜIN PONUMERE!

PROFITU PER „LITERATURA MONDO“;

Kolektu abonantojn ankaŭ alilandajn. Post du abonantoj vi ricevas L.M. dum duonjaro senpage, post kvar por tuta jaro. Vendu po numeroj. — Reprezentantoj rajtas depreni 20% de la abonprezo.

HUNGARA
NUTRAĴLIVERANTA
KAJ KOMERCA A. S.

IMPORTO EKSPORTO

ADMINISTREJO:
BUDAPEST, V., FÜRDŐ-UTCA 2.

*** END OF THE PROJECT GUTENBERG EBOOK LITERATURA MONDO, NUMERO 3, 1922
DECEMBRO ***

Updated editions will replace the previous one—the old editions will be renamed.

Creating the works from print editions not protected by U.S. copyright law means that no one owns a United States copyright in these works, so the Foundation (and you!) can copy and distribute it in the United States without permission and without paying copyright royalties. Special rules, set forth in the General Terms of Use part of this license, apply to copying and distributing Project Gutenberg™ electronic works to protect the PROJECT GUTENBERG™ concept and trademark. Project Gutenberg is a registered trademark, and may not be used if you charge for an eBook, except by following the terms of the trademark license, including paying royalties for use of the Project Gutenberg trademark. If you do not charge anything for copies of this eBook, complying with the trademark license is very easy. You may use this eBook for nearly any purpose such as creation of derivative works, reports, performances and research. Project Gutenberg eBooks may be modified and printed and given away—you may do practically ANYTHING in the United States with eBooks not protected by U.S. copyright law. Redistribution is subject to the trademark license, especially commercial redistribution.

START: FULL LICENSE